


KONGRESA NUMERO

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 562 (9)

SEPTEMBRO 1952



fotoj : B. Zell

(supre)

La urbestro en la balo kun la prezidanta paro.
Post la prelego pri Indonezio—kun nia raportanto
D-ro Szilágyi kaj, nur duone, Komitatano Dahl.

(malsupre)

Sur la ŝtupoj de la Kongresejo.
T. Logar (Ljubljana) parolas kun Prezidanto Malmgren.

N-ro 562 (9)

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JÄKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO
 Palais Wilson, Genève, Svis.
 Urgajn informojn sendu rekte
 al Rickmansworth

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Herongate, Rickmansworth, Herts.,

Anglujo

Jara abono (1952) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paço £6 ½ paço £3

$\frac{1}{4}$ paço 30 êil. $\frac{1}{8}$ paço 15 êil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duoj da vortoj

Legantoj en 74 landoj

Eldon **numero 6000**



Enhavo

La 37-a Universala Kongreso de Esperanto : D-ro F. Szilágyi :

Paço

Grava Kulturmanifesto	..	..	..	..	..	..	225
La Solena Inaŭguro	..	..	..	..	..	..	226
La Inaŭguro de la Somera Universitato	..	..	..	..	..	..	231
La Distra Vespero	..	..	..	..	..	..	237
La Arta Vespero	..	..	..	..	..	..	241
Belartaj Konkursoj	..	..	..	..	..	..	243
La Balo	..	..	..	..	..	..	246

Specialaj artikoloj :

La Solena Inaũguro de la monumento honore je D-ro Zamenhof, en Wörgl,
Aŭstrujo : *Hans Jakob*

250

Konstantaj Rubrikoj :

Enigma Konkurso N-ro 70	..	..	..	..	..	..	256
Esperantista Vivo	..	..	..	..	..	..	256
Internacia Konkurso 1952	..	..	..	..	..	..	256
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	..	254
Radio kaj Esperanto	..	..	..	..	..	..	253

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 562 (9)

SEPTEMBRO 1952

D-ro F. Szilágyi.

La Kongreso en Oslo — Grava Kulturmanifesto

SABATE, la 2-an de aŭgusto, 1952. Ni ĵus alvenis al la ĉijara ĉefurbo de la esperantistaro. Nin ĵus ekravis la blue, aŭ flave ondetanta akvo de la granda fjordo, depende de tio, ĉu la nuboj malaperis de la ĉielo, aŭ ili reekposedis sian lokon sur la kaprice ŝanĝigema firmamento. La naturo, jen majesta, jen gracia, kaj same la renkontiĝo de la praa eturbo kaj la tendenco por transformi la urbon je moderna, granda metropolo, tiuj ĉi tri komponaj partoj donas rezulton de speciala aspekto, individua ĉarmo. Ankaŭ la ridetantaj, helkoloraj, laŭ hararo kaj haŭto, norvegoj, sed eble eĉ pli la norveginoj kontribuas tre grave al la “hela” impresio, kiun la urbo faras al ni. Lingvaj malfacilaĵoj ekzistas, ĝis ni transpasas la sojlon de la svarmanta kongres-akceptejo. Sufiĉe multaj ni estas, kiuj venis el la alia skandinavia lando, Svedlando, kaj sentas nin tute sekuraj kun la parenca sveda lingvo, sed ho ve, tuj klariĝas, ke la parenca lingvo ne ĉiam estas komprenebla. Iom poste

dum kongresa someruniversitata prelego ni aŭdas pri lingvoscienculo, kiu estis gravulo en sia fako. Li bonege konis ok lingvojn, el kiuj sep estis—norvegaj. . . .

Granda amaso ondas sur la strato. Ni alvenis je grava dato: la reĝo, Haakon la VII-a morgaŭ, la 3-an de aŭgusto, atingos sian 80-an jaron. Populara, tre demokrata monarko, la sola elektita reĝo en la mondo. La libera, demokrata nacio per spontanea solenado deziras manifesti sian simpatian al la reĝo kaj al tiu demokratia idealo, kiun la dinastio reprezentas. Multe da eksterlandanoj troviĝas



en la urbo. Ne nur esperantistoj, sed ankaŭ “sovaĝaj” eksterlandanoj. La gazetaro dum la unuaj tagoj dediĉas atenton ĉefe al la okazaĵoj en kontakto de la reĝa datreveno, sed ĝi ne forgesas nin tute. Unu el la gravaj gazetoj bonvenigas nin per esperantlingva saluto kaj dum la tuta daŭro de la kongreso aperigas raportojn kaj novaĵojn ankaŭ en nia lingvo. *Verdens Gang*, la menciita gazeto, estis diligente aĉetata de la

kongresanoj, kiuj volis orientiĝi pri la mondokazaĵoj dum la semajno, sed supozeble ankaŭ aliaj motivoj kunagis. Tion asertas le eldiro de juna samideano :

“Tiuj ĉi norvegoj estas tre ruzaj. Kiel oni povas sidigi al la gazetvendista tablo tiel belan, junan norveginon? Mi jam trifoje aĉetis la hodiaŭan gazeton”.

La plej granda parto de la kongreso okazos en la ejoj de la klasikstila, malnova universitato. Antaŭ tiu konstruaĵo flirtas niaj du grandaj flagoj ; en ties ekstera korto kolektiĝas amaso da aŭtoj kaj aŭtobusoj, kiuj elverŝas sian multkoloran publikon. En la universitata vestiblo laboras, penas kaj ŝvitas la kongresoficistoj, gvidataj de la ĉiam amika, ĉiam vigla, kaj inter ĉiuj cirkonstancoj tre simpatie ridema sekretario, **Mason Stuttard**. Antaŭ la servotabloj abelsvarmas klopodemaj

kaj persistaj kongresanoj. La oficistaro bone eltenas la atakon, kaj la kongreso ankoraŭ malrapide eksvingas sin. Ni estas jam meze de la varia amaso, kiu ĉijare prezentas la aspekton de ĉiuj kontinentoj : el 35 landoj proksimume 1700 kongresanoj ĵetas sin en aŭtojn, tramojn, aŭtobusojn, aŭ piede kuras al sia hotelo por pretigi sin por la Interkoniĝa Vespero en la Domo de Inĝenieroj.

Ni interkoniĝas kun novaj kaj malnovaj konatoj en amaso da grandaj kaj malpli grandaj salonoj, ĉiu laŭ sia propra gusto. Trovi **unu** lokon por tia amaso, t.e. unu grandegan salonon, ne estis eble en Oslo. Sed la interligo ne ĉesas kaj la plej granda parto de la kongresanoj migras de salono al salono kaj interkoniĝas kun ekstrema intenso. Nacilingvajn interparolojn nur ege sporade oni povas aŭdi. Per tio komenciĝas la kongresa semajno.

La Solena Inaŭguro

(en la urbo de la senfinaj tagoj kaj mallongaj noktoj)

DU diversreligiaj diservoj, katolika en la preĝejo de Sankta Olav kaj protestanta, en la apuda preĝejo de la Triunuo malfermas nian tagan programon. **Pastro Thalmaier** gvidis la katolikan diservon, post la bondeziraj vortoj de la episkopo en Oslo, **D-ro Jacobus Mangers**. **Pastro R. Overvoll** el Oslo predikis dum la protestanta diservo. Liaj finaj vortoj restas memorindaj : *“La lingvo estas potenca rimedo, sed ĝi sola, sen la forto de la koroj, ne povas interfratigi la homojn”.*

Dum la oficiala fotografado oni konsciiĝas unue, kiel giganta

organismo estas la kongreso, sed ankaŭ pri tio, kiel unuece ĝi vivas.

* * *

Ni rapidas manĝi kaj poste ni kuras al la plej granda filmteatro de Oslo, Colosseum, kie la **Solena Inaŭguro** okazos. La esperantistaro tute plenigas la salonon, kaj oni venas eĉ precize. **S-ro Frank Merrick** malfermas la programon per fortepianludo. Estas io simbola, ke li ludas—virtuozes—ĝuste la Polonezon (en A) de Chopin. Oni pensas pri la malproksima, nun ege malproksima pola regiono, sub kies suno Chopin kaj Zamenhof ekvidis

*La Inaŭguro de
la 37-a U.K. en
Colosseum, Oslo*

foto : Sune Ahlm



la sunon, kaj oni serĉas paralelon inter la nervozaj, serĉaj, sed sendube optimismaj tamburantaj tonoj de la Polonezo kaj inter la vivoverko de Zamenhof, kiu same optimisme leviĝas el la maltrankvilo de la nuno.

La muziko finiĝas kaj sur la scenejo, kun la fono de la giganta esperanto-flago, migranta de kongreso al kongreso, ekparolas **la Urbestro de Oslo, S-ro Brynjulf Bull** :

“Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj,

“Estas por mi granda ĝojo ke mi, “en la nomo de la urbo Oslo, povas “saluti al la partoprenantoj en la “Esperanto-kongreso: koran “bonvenon al Oslo.

“En la multvaria kaj konfuza “mondo, en kiu ni vivas, la diverseco “de la lingvaj esprimformoj estas “unu el la plej grandaj problemoj, “kiujn ni devas venki. La lingva “diverseco ne nur malfaciligas la

“kontakton inter la homoj, sed mal- “helpas la personan kontakton “efektivigeblan per interparoloj en “lingvo, kies nuancojn ĉiuj regas.

“Tial estas tute nature ke la “homoj dum longaj tempoj okupiĝas “pri la penso pri mondlingvo, kiun “ĉiuj povus kompreni kaj regi. Estas “nature ankaŭ ke ĉi tiun penson oni “klopodis solvi per lingvo logike “konstruita, simpla en sia gramatiko, “kaj tial relative facile lernebla. “Estas kompreneble ankaŭ ke ĉi tiun “lingvon oni klopodis konstrui el “elementoj de ĉiuj ekzistantaj lingvoj “en la mondo.

“Mi deziras danki al la multaj “virinoj kaj viroj, kiuj dum la jaroj “entuziasme laboradis por efektiviĝi “ĉi tiun penson. Malantaŭ ĉi tiu “penso kuŝas deziro atingi tion, al “kio ni ĉiuj strebas: komprenon, “amikecon, kaj pacon inter la popoloj.

“Estas mia espero ke ĉi tiu laboro
 “ĉiam estu daŭrigata, tiel ke ĉi tiu
 “movado, kune kun la aliaj inter-
 “naciaj movadoj strebantaj al la
 “sama celo, rezultigu novan kaj pli
 “bonan mondon.

“Mi esperas ke ĉiuj; kiuj alvenis
 “al ĉi tiu mondkongreso, travivu
 “agrablan tempon en nia urbo, ke
 “ili bone fartu ĉi tie, renkontu
 “komprenon kaj amikojn kaj ricevu
 “la impreson ke oni ĉi tie estas
 “kaptitaj de la sama intereso kaj
 “interesiĝas pri la sama celo, al kiu
 “vi laboradas. Mi esperas ankaŭ ke
 “la nun malfermata kongreso estu
 “fruktodona por via laboro.

“Denove mi deziras al vi ĉiuj :
 “koran bonvenon al Oslo”.

La paroladon sekvis vera aplaŭd-
 uragano, ĉar la urbestro diris la
 paroladon rekte **en esperanto**, kun
 vere klara, bonega elparolo. Oni
 povas aŭdi, kiel unu el la prelegontoj
 de la Somera Universitato turnas sin
 al sia norvega najbaro :

“*Kiam la urbestro lernis tiel bone
 esperanton ?*”

“*Se mi ne eraras, hieraŭ*”, sonas la
 respondo.

Sed nun la trimilokula amaso
 sendas siajn vidradiojn al nova
 parolanto.

**La Prezidanto de UEA, S-ro Ernfrid
 Malmgren**, malfermas la kongreson :

“Ni venas el trideko da landoj por
 “invadi la norvegan ĉefurbon. Sed
 “ni ne venas altrude, ni ne venas
 “kiel malamikoj”.

Post mencioj kaj dankoj al la
 oficialuloj kaj aŭtoritatoj de la
 norvega kultura kaj socia vivo pro
 la aktiva bonvolo al nia kongreso,
 sinjoro Malmgren diras jene :

“Ni venis por ĝui la gastamecon
 “de la norvega popolo. Permesu al
 “mi, karaj norvegaj gesamideanoj,

“en tiu ĉi momento esprimi nian
 “feliĉon, esti en via rondo. Dum la
 “lasta milito, kio okazis antaŭ nur
 “kelkaj jaroj, ni admiris la persistan
 “eltenon de la norvega popolo kaj de
 “la norvega registaro. Ĉar ĝuste
 “hodiaŭ la norvega reĝo, lia moŝto
 “Haakon, festas sian 80-jaran
 “jubileon, mi proponas, kvankam ne
 “estas kutimo ĉe niaj universalaj
 “kongresoj saluti la ŝtatestron, ke ni
 “hodiaŭ faru escepton, sendante
 “gratulotelegramon, kiel simbolon de
 “niaj simpatiaj sentoj al la norvega
 “popolo.

“Ankaŭ la esperantista popolo
 “estas batalanta popolo, ankaŭ ĝi
 “devas fari sian militservon—aŭ pli
 “ĝuste sian pacan servon. Ni kredas,
 “ke la paco, la amikaj rilatoj inter
 “la popoloj, la grandaj popoltavoloj,
 “povos ekesti nur, se la mondo
 “posedos komunan lingvan
 “fundamenton kaj nur se tiu
 “fundamento estos same firma por
 “ĉiuj. Persono kiu uzas sian gepatran
 “lingvon, estas kiel homo, kiu staras
 “sur la tero kaj bone povas estri sian
 “korpon, ĉar li havas firman
 “fundamenton. Sed kiu uzas
 “fremdan nacian lingvon, similas al
 “homo, kiu provas en la mezo de
 “rivero manovri siajn movojn,
 “balanciĝante sur flosanta trabo aŭ
 “trunko. Nur la plej lertaj povas
 “stari trankvile sur tiu trunko. La
 “plej multaj ne kapablas, ili bezonas
 “la firman teron kiel fundamenton.

“Esperanto ne estas trunko aŭ
 “trabo, ĝi estas ponto. Kaj tiajn
 “pontojn ni esperantistoj konstruas,
 “por ke la homoj povu facile marŝi
 “de lando al lando. En tiu konstrua
 “laboro partoprenas la esperantistoj
 “el 83 landoj. Laŭ ĵus farita esploro
 “proks. 400.000 personoj hodiaŭ
 “uzas aŭ povas uzi nian lingvon en

“siaj rilatoj trans la mondlimojn.*
 “Se ni alkalkulas ankaŭ la familiojn
 “de la esperantistoj, kiuj estas pli-
 “malpli sub la influo de esperanto,
 “ni certe atingas la sumon de unu
 “miliono. Jen do popolo, ankoraŭ
 “ne granda, tamen pli granda ol
 “multaj suverenaj ŝtatoj de la mondo.
 “El tiu popolo dekono estas aktivaj
 “esperantistoj, t.e. ke ili libervole
 “transprenas la taskon fari labor-
 “servon por la internacia lingvo.
 “Estas la ataktrupoj, estas la pioniroj.
 “Kaj inter tiuj pioniroj estas vi: mi
 “dankas vin kaj gratulas vin”.

Post tio la Prezidanto parolas pri la divido de la esperanto-laboro inter diversaj lokoj kaj personoj, kaj pri la stimula efiko de la kongresoj. Li daŭrigas:

“Sed la plej granda stimulo por ni
 “tamen estas kaj restas la personeco
 “de Zamenhof, la kreinto de
 “Esperanto.

“Ne-esperantistoj malfacile povas
 “kompreni niajn sentojn al nia
 “majstro Zamenhof. Ili diras:
 “Zamenhof evidente estis granda
 “lingva genio. Sed troviĝas multaj
 “aliaj granduloj, ekz. la inventistoj
 “de la presmaŝino, de la telefono, de
 “la radio k.t.p. Sed malofte ni pensas
 “pri ili kaj ankoraŭ pli malofte ni
 “solene laŭdas tiujn personojn:
 “Gutenberg, Bell, Marconi, Edison.

“Sed la vivo de Zamenhof montras,
 “ke la kreo de la internacia lingvo
 “estis nur parto de lia idealismo. La
 “interpopola frateco estis lia revo.
 “Li montris per siaj agoj, ke li
 “konsideris sin nura rimedo por la
 “interfratigo de la popoloj. Kaj
 “kiam li aperis antaŭ la publiko, li
 “ĉiam estis modesta, humila,

“senpretenda. Li ne serĉis honoron,
 “li ne pretendis esti laŭdata.

“Henrik Ibsen, la granda norvega
 “poeto, prave diras en Peer Gynt, ke
 “al vera homo oni prave povas diri:
 “Estu vi mem! Tia estis Zamenhof:
 “malgraŭ obstakloj, malgraŭ
 “humiligoj, eĉ insultoj, malgraŭ
 “zorgoj diversspecaj, kaj aliflanke
 “malgraŭ la adorado de la adeptoj
 “li neniam falis en la danĝeron
 “okulumi al la gnomoj, la troloj de
 “Peer Gynt, kiuj flustris en lian
 “orelon: *Estu vi mem memsufiĉe!*

“Esperantistoj, imitu la ekzemplon
 “de Zamenhof: Estu vi mem! Iru
 “vian vojon! Fosu vian sulkon!
 “Sed ne estu vi memsufiĉe. Ĝoju
 “pri la favoro, kiun jam donis kaj
 “donas al vi esperanto, sed daŭrigu
 “malegoiste vian laboron konstrui
 “pontojn inter la popoloj”.

La trankvilajn, seriozajn, sed optimismo-plenajn vortojn de nia Prezidanto akceptas forta, aplaŭda plaĉo.

La Ministro de Eklezio kaj Edukado en Norvegujo, S-ro Lars Moen, i.a. norvege diris la jenon:

“Estas forta, mondampleksa
 “organizaĵo, kiu kunvenas por
 “kongreso ĉi tie. La impona nombro
 “de partoprenantoj kaj la nombro de
 “landoj, el kiuj la partoprenantoj
 “venas, rakontas pri tio. . . . La
 “interligo kaj kunlaboro trans la
 “limoj, kiuj pli aŭ malpli nature
 “estas lokitaj inter diversaj landoj
 “kaj diversaj popoloj, iĝas pli kaj
 “pli decidaj por la materia kaj
 “kultura evoluo en la mondo. Restos
 “ĉiam malpli da aferoj, kiuj estas
 “naciaj en la signifo ke ili nur
 “koncernas la propran landon kaj
 “popolon. La koncepto ‘Unu mondo’
 “ricevas pli kaj pli grandan realecon.
 “Malgraŭ tendencoj al izolado kaj

* La plena statistiko troviĝas sur p.176-177, Junia n-ro.: Red.

“malgraŭ baroj de multaj specoj la
 “evolutendenco tamen estas en tiu
 “direkto. Ĉar estas fortaj kaj bonaj
 “potencoj kiuj laboras por tio. Kaj
 “inter ili estas UEA.

“Unu el la malhelpoj en la
 “internaciaj interrilatoj estas ke
 “homoj de unu popolo en malgranda
 “grado komprenas la lingvon de
 “aliaj popoloj. Tiun problemon la
 “esperantistoj volas solvi per
 “enkonduko de nova lingvo, kiu estas
 “neŭtrala kaj ne kreas rivaladon kaj
 “prestigan batalon inter la lingvoj,
 “kiuj hodiaŭ estas uzataj de la
 “grandaj homgrupoj.

“Mi supozas, ke estas ankoraŭ
 “malproksima la tago, kiam oni povos
 “diri, ke la programo estas realigita.
 “Sed la aliĝo, kiun la ideo havas
 “hodiaŭ kaj kiu i.a. montras sin en
 “la aliĝo al tiu ĉi kongreso, donas
 “bazon por granda optimismo.

“Mi prezentas dankon al la
 “esperantistoj pro la kontribuo al
 “la paco kaj kulturo, kiun ili faris
 “kaj faras, pro la bona ekzemplo,
 “kiun ili montras de tio, ke homoj
 “kun diversaj opinioj pri religiaj,
 “politikaj kaj aliaj disputataj
 “demandoj, povas kunlabori pri
 “pozitivaj entreprenoj por la komuna
 “bono”.

Kiel ankaŭ tiuj ĉi du ekzemploj
 montras, la kongreso ĝuis la konfidon
 kaj la favoron de la plej altaj sociaj
 aŭtoritatoj. Ĝia ĉefprotektanto estis
Olav, la norvega Kronprinco (je la
 ĵaŭdo de la kongres-semajno
 Kronprinco Olav akceptis S-rojn
 Støp-Bowitz, la prezidanton de la
 LKK kaj Malmgren, kaj tiufoje, kiel
 ni scias, li pruvis fundan konon de
 la internacia lingvoproblemo. Kun
 granda intereso li akceptis la
 ŝlosilkolekton kaj ceterajn
 informilojn, kiujn al li oni proponis).



*S-ro C. Støp-Bowitz
 La Prezidanto de la LKK*

S-ro C. Støp-Bowitz bonvenigis la
 kongreson en Oslo en la nomo de
 LKK.

Varia, kolorriĉa estis la sinprezento
 de la diversaj registaraj repre-
 zentantoj: Frank Halls (Aŭstralio),
 Ĝen-Konsulo Orvig (Aŭstrujo), F-ino
 S. Obozinski (Belgujo), J. B. Mello e
 Souza (Brazilo), P. Petit (Francujo),
 Legacia Sekretario Zaimal Arifin
 Samil (Indonezio), S. Ziegler (Federala
 Germana Respubliko), I. R. G.
 Isbrucker (Nederlando), Rektoro K.
 Söderberg (Svedujo), Ministro E. de
 Haller (Svislando), Ĝen. Konsulo
 E. J. R. Montaña (Urugvajo), kaj
 reprezentanto de la Nov-Zelanda
 Ĉef-Ministro, E. Thawley. 20 landaj
 asocioj reprezentigis sin dum la
 kongreso kaj salutis ĝin. Du salut-
 paroladoj, tiu de S-ro Isbrucker kaj
 tiu de S-ro Setälä, faris komparon
 inter la ĵus okazinta olimpiado, kaj
 inter Esperanto, kies interfratiga
 karaktero estas multe pli konkreta
 ol tiu de la olimpiaj ludoj, dum kiu
 la lingvo apenaŭ havas ian rolon.

Per brila festparolado ĝuigis **Prof.
 Ivo Lapenna** la aŭskultantaron. Li
 enkonduke laŭdis la norvegan popolon
 kaj cetere la tutan Nordon pro ilia

granda laboro por kulturaj celoj kaj la ekzemplo kiun ili montris kiam temas pri solvo de problemoj interlandaj.

En sia parolado li akcentis la kulturan flankon de la Esperanta movado. Nia 37a Kongreso estas nova pruvo pri tio, ke la lingvo Esperanto brile taŭgas sur kiu ajn kampo de la homa vivo.

La homoj en la antikva Grekujo, diris la parolanto i.a., konkursis ne nur pri korpaj kapabloj, sed eĉ pligrade ili priatentis la artajn kaj intelektajn kapablojn. Al la Olimpiaj ludoj en Finnlando oni portis flamantan torĉon el Grekujo en la Olimpian urbon Helsinki. Ankaŭ al nia Kongreso venis multaj centoj da brulantaj torĉoj en koroj, kaj centoj da steloj simboligantaj la esperon.

Li finis insiste admonante la esperantistaron daŭrigi la grandiozan laboron por efektivigi nian belan ideon; tiun ideon kiu estas esprimebla en la jenaj malmultaj vortoj: unu mondo, unu homaro, unu komuna lingvo.

Post la iom pli frue kantita norvega nacia kanto nun ni kantas *La Esperon*, kaj ni sentas, ke **ne** staras forte la muroj dividitaj. Almenaŭ ne al ni!

* * *

La inaŭguro de la paralela Blindula Kongreso okazis dum la sama tago. **S-ro Halvdan Karterud** prezidis, la Honora Prezidanto, **S-ro O. B.**

Sletterød, faris profundsentan malferman paroladon. Salutoj venis el ok landoj. **S-ro Bjarne Nökleby** en la nomo de Norges Blinddeförbund, **S-ro Oskari Lehtivaara** en la nomo de la Skandinavia Kunlaborkomitato salutis la Kongreson. **Akademiano V. Setälä**—mem instruanto en kursoj por blinduloj jam de 1912—esprimis siajn bondezirojn al la Kongreso.

La ĉeestantaro, konsistanta el ĉ. 120 personoj, decidis ke **S-roj Harald Thilander** (Svedlando), kaj **W. P. Merrick** (Britujo) estu elektitaj kiel honoraj membroj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj. Du meritplenaj batalantoj estis distingitaj per tiu ĉi decido: H. Thilander, la 75-jara “profeto de la blindulara popolo”, nevidanto, kaj apenaŭ aŭdanto, estas unu el la plej belaj ekzemploj de la nobla, aktiva forto; W. P. Merrick estas 84-jara, aktivulo, kiu baldaŭ atingos sian 50-jaran jubileon en la esperanto-movado.

La Kongreso decidis sendi salut-telegramon al la norvega Reĝo.

Al la programo de la dimanĉa tago apartenis ankaŭ la estrarkunveno de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, kie **F-ino Violet Nixon** prezidis. Oni decidis komisi al **F-ino Dedieu** esplori, ĉu la organizaĵo povus disponi 1–2 paĝojn en la organo de la francaj esperanto-instruistoj.

La estraro de ILEI formiĝis jene: Prezidanto—V. Nixon, Vicprezidanto—J. Dedieu, Sekretario kaj Kasisto—Einar Dahl.

La Inaŭguro de la Somera Universitato

PLURAJ faktoj pravas, ke niaj Kongresoj pli kaj pli akcente prezentas sin kiel kulturaj manifestiĝoj. La kongresanaro kompreneble ne konsistas el asketoj, kaj la Kongreso en Oslo proponas

abundon da kongresaj plezuroj, kiujn la pli-malpli junaj kongresanoj akceptas kun egala, infana ĝojo; sed plenaj salonoj dum la prelegoj montras, ke nia multifacetita popolo soifas la kulturon.

La inaŭguro de la Somera Universitato dimanĉe vespere kolektas vastan publikon en la Aŭlo de la Universitato, kaj tiu intereso ne ĉesas dum la daŭro de la kongresa semajno. La publiko komprenas, ke nia lingvo estas kultura faktoro kaj kulturrimedo, kaj volas havi utilon en la valoraj prelegoj.

Prof. Olav Reiersøl akcentas ĝuste tiun ĉi taskon de nia movado en sia enkonduka parolado, akcentante la rolon kaj neceson de Esperanto sur la kampoj de sociaj esploroj kaj kunlaboro. La scienco, kiu inventis ne nur benon sed ankaŭ la detruon, devas prizorgi, eviti, la danĝerajn sekvojn de tiuj inventoj. Li gvidas niajn pensojn al la postulo de internacia universitato, kies bazo estas facila, tamen ampleksa kaj esprimriĉa lingvo kiel Esperanto. La ĉiujaraj someraj universitatoj estas la portantoj de tiu ĉi grava penso.

Ĉar laŭ la planoj pluraj prelegoj de la Somera Universitato aperos iam sur la folioj de nia gazeto, nur mallonge ni raportu, ke la prelego de **Prof. W. E. Collinson** okupis sin pri la metodoj, per kiuj oni klasigas la lingvojn kaj la strukturajn problemojn de la lingvoj. Per interesaj ekzemploj li prezentis la diversajn tipojn de la lingvoj. Esperanto staras inter la aglutinaj (afiksmetodaj) kaj fleksiaj (kiel la okcidenteŭropaj) lingvoj, kaj ĝi montras sin tre uzebla

komparilo kaj utila rimedo por analizo en la lingva scienco.

Post la forte aplaŭdita prelego de Prof. Collinson **Rektoro Karl Söderberg** prelegis pri la popola altlernejo en Skandinavio. Tiu ĉi institucio, kiu ĵus solenis sian 100-jaran naskiĝtagon, grave kontribuis al la demokratio kaj kulturo de la skandinavaj landoj. La popolaj altlernejoj sin turnas al kleravidaj plenkreskuloj, plej ofte al kampara publiko, al kiu ili celas doni ne difinitan kvanton da scioj, sed lumigon pri la vivo. La lernantoj vivas dum la ĉ. duonjara studperiodo en la lernejoj, kaj en tiu familia kunestado altvaloraj fortoj povas libere efiki, kaj komuna laboro, komuna sento, kunigas la homojn. En tiu ĉi formo ni danke rekonas la spiritan heredaĵon de la dana granda pioniro de la penso pri la popola altlernejo, N.F.S. Grundtvig.

La hela norda vespero jam transiras en sian vualan duonmallumon, kiam ni tre kontentaj pro la ĵusa prelego, forlasas la universitaton kaj miksas nin en la solenan amason de la norvega ĉefurbo. Ĉe la potenca, kolosa, nova urbodomo oni perdiĝas en la maro de la lumo, tonoj kaj homoj. Sur la reala maro la ŝipoj sendas sian lumon al ni kaj la nubojn, disiĝintajn post la taga pluvo, orumas la lastaj purpuraj sunradioj.

Ne estas facile enlitiĝi en la urbo de "senfinaj tagoj kaj mallongaj noktoj", kiel unu el la festparolantoj nomis la norvegan ĉefurbon.

LOKA KONGRESA KOMITATO: OSLO

Prezidanto : Carl Støp-Bowitz

Vicprezidantoj : Johan Hammond Rosbach, Olav Rygg

Sekretario : Bj. Ottesen

Kasisto : Sv. Brantsæter

Komitatanoj : Birger Allmork, Harda Danielsen, Lillemor Fischer,
Olav Reiersøl, Brynhild Østme, Einar Aarsæther

Senfinaj Tagoj

ONI dormas tre mallonge kaj lunde matene oni povas konstati, ke pli ol 500 kongresanoj ĉeestas la Ĝeneralan Kunvenon, kies Prezidanto, **S-ro Ernfrid Malmgren**, legas salutleterojn kaj telegramojn, i.a. de M. Herriot, Prezidanto de la Franca Deputita Ĉambro kaj Urbestro en Lyon, tiujn de la ministro de eksteraj aferoj de Urugvajo, de la Urbestroj en Vieno kaj Wörgl, de konataj esperantistoj: Nylén, Bastien, Carreira, Kempeneers; li peras la salutojn de la polaj kaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj.

S-ino Isbrucker en la nomo de la Internacia Esperanto-Instituto, **D-ro Hugo Sirk** en la nomo de la Altlernejo en Vieno salutas la kunvenon, **S-ro Støp-Bowitz** de ISAE, **S-ro A. A. Ager** de la Kooperativa Asocio en Londono. Sekvas mallongaj raportoj pri longa kaj penoplena laborjaro.

Estrarano A. C. Oliver raportas pri la financoj kaj administrado. Lia raporto estas kontentiga kaj liaj esperoj estas optimismaj kaj reale bazitaj. Pro la krizo kaj prezaltiĝoj ĉirkaŭ 5% eksiĝis, sed tiu relative malgranda reduktiĝo ne estigos ekonomian malgajnon en tiu ĉi jaro. Li instigas por varbado de novaj individuaj membroj de UEA.

Estrarano D. Kennedy raportas pri la fakaj asocioj de UEA. Nur unu el la 12 sekcioj ne sendis raporton.

1. IAPK havas propran revuon kaj 200 membrojn en 18 landoj.
2. IKUE eldonas la organon "*Espero Katolika*".
3. ILEI havas 7 landajn asociojn.
4. ILEPTT nun reorganizas sin.

5. ISAE havas en 12 landoj 327 membrojn.
6. KELI aranĝis kelkajn konferencojn kaj laboras vigle.
7. KES raportas pri 136 membroj.
8. TEĴA La Prezidanto, S-ro Einar Adamson, raportis pri bonaj kontaktoj dum sia vojaĝo en Jugoslavujo.
9. TEKA havas 280 membrojn en 12 landoj.
10. TJO havas en 30 landoj 750 membrojn. Pasintjare Haarlem, ĉijare Ry estas ĝia kongresloko.
11. UL, la plej forta el la fakaj asocioj, havas 7771 membrojn, 37 landajn reprezentantojn kaj 1346 aktivajn membrojn.

Pro teknika kaŭzo oni interrompas la raportadon kaj la Prezidanto deklaras la parolon libera. Inter la faritaj demandoj la kunlaboro inter UEA kaj SAT estigis viglan diskuton, kies konkludon faris S-ro E. Malmgren: kunlaboro ekzistas* sed kunfandiĝo momente ne ŝajnas esti ebla.

Pri komuna kongresaranĝo kun SAT oni diskutis. Laŭ S-ro Malmgren le plej granda malhelpo tiurilate estas la teknikaj lokaj baroj de la kongresoj. Kongreso ekz. kun 5000 partoprenantoj multilate malfaciligas la laboron de la aranĝantoj kaj reagas ankaŭ la psika efiko de la kongreso, kies kontaktoj nun sendube estas intimaj. Per tio li ne volas diri, ke li ne plene subtenas la kunlaboroninter la du organizaĵoj; kontraŭe, li ĉiam laboras por kunagado inter UEA kaj SAT.

* vidu la konatan leteron al Stalin en la junia numero de "Esperanto".

Sekvas la raporto de **Estrarano Lapenna** pri la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. CED sendas dokumentojn en tri lingvoj al pli ol cent institucioj, kaj tiuj dokumentoj vekas videble intereson tiel, ke gravaj organizaĵoj mem anoncas sin por ricevi ilin. Kun plezuro li konstatas, ke la kultura nivelo de niaj kongresoj grave altiĝas kaj en tiu kontakto li mencias la ĵusfermitan belartan konkurson, kies juĝantoj devis elekti premiotojn inter pli ol cent konkursaĵoj. Nia Somera Universitato povas esti komenca etapo de evoluo, gvidanta al pli longa somera universitata kurso en iu universitata urbo ĉiusomere. La prelegoj de la S.U. devus esti presataj, sed tiurilate la esperantistaro nepre devas montri pli grandan komprenon pri la afero ol ĝis nun. La prelegoj de la Malmö Kongreso aperis en libroformo, sed la vendita kvanto dum la pasintaj kvar jaroj ne pruvas iaspecan febran intereson pri la afero.


S-ro J. Isbrucker, la Prezidanto de la Akademio, salutas la Kongreson en la nomo de la Akademio.

Raportante pri la kvara sekcio, Esperanto en la Internacia Trafiko kaj Komerco, **S-ro Petit** akcentas la gravecon kaj propagandan efikon de la esperantistaj aŭtobuskaravanoj kaj internaciaj stud- kaj ceteraj aranĝoj. Samtempe li atentigas pri la t.n. Dulingvismo, t.e. la propono, ke en la tuta mondo nur du lingvoj estu instruataj, t.e. la angla kaj franca laŭ elekto. La angla lingvoteritorio do uzus la francan kiel duan lingvon, la francoj la anglan. Tiu ĉi propono havas fortan apogon en Usono kaj ni devas esti pretaj plenforte kontraŭbatali ĝin.

D-ro Szilágyi opinias dezirinda aranĝi infankunvenon dum la

Kongresoj por esperantistaj infanoj kaj petas permeson aranĝi tian jam dum la nuna Kongreso.

La Prezidanto fermas la kunvenon post atentigo, ke la eventualaj proponoj antaŭ la prezentado en la Kongreso estu diskutataj en la koncernaj lokaj grupoj. Estas grave, ke la proponoj indiku la eblecojn kaj la manierojn de la ekonomia solvo.




*Kapitano Bugge-Paulsen
Komitatano de U.E.A.*

La serio de prelegoj pri Norvegujo altiris grandan publikon. La unua en tiu serio estis la prelegeto de **Kapitano R. Bugge-Paulsen** pri genia skulptisto, Vigeland, pri kiu estis asertite: "Gustav Vigeland reprezentas la kulminon de la individuismo". La nordo ne estus nordo, se ĝi ne donus ekzemplon, kiel uzi plej celkonscie la kulminon de la individuismo por la celo de la socio. Dank' al la Urbestaro de Oslo ĉiuj verkoj de la skulptisto estas kolektitaj en la t.n. Vigeland-parko, kiun la kongresanoj, precipe post la prelego, diligente vizitis.

* * *

Posttagmeze kvar sekcioj havas sian kunsidon samtempe. La elekto estis malfacila kaj kaŭzis ofte animan barakton al la gesamideanoj, el kiuj ne malmultaj elektas iun kvinan

programpunkton, pri kiu nek la riĉenhava kongreslibro nek la raportisto povas doni detalojn. Ĉiuokaze ĉ. 400 kongresanoj partoprenas la sekciajn kunvenojn.



Estrarano David Kennedy

En la **Unua Sekcio** 250 partoprenantoj sekvas kun intereso la temon kaj diskutojn pri la eduka valoro de la kunvenoj en la esperanto-grupoj. Prezidas **S-ro D. Kennedy**. **S-ro Vuko Jovanovic** emfazas por la altiro de la junularo kaj por konsidero de tiu ĉi vidpunkto ankaŭ en la klubaj programoj. Viva gazeto kun mallongaj programpunktoj allogas pli ol longaj prelegoj. Post la rektmetodaj kursoj oni aranĝu tuj studrondetojn. Por intelektuloj oni uzu miksitan metodon. **S-ro T. Logar** proponas eksperimentan instruadon al infanoj en lernejoj de diversaj landoj kun konstanta kontrolo kaj kun la aranĝo de posta infankongreso, eventuale en la kadro de UK. **F-ino Noll** rekomendas efikan prizorgadon de la novuloj. Oni aranĝu oratorajn konkursojn ankaŭ en la grupoj. **S-ro Nordwall** proponas interŝanĝan viziton de diverslandaj grupoj; **F-ino Gray** interŝanĝon de la plej sukcesaj kunvenprogramoj. **S-roj Halls** kaj **Dahl** opinias, ke oni ne troemfazu pri la facileco de Esperanto por ne akiri kontraŭulojn. Oni povas bone kombini la metodojn. S-ro Dahl

konsideras nia plej grava tasko, varbi la instruistaron al nia afero.

La **Dua Sekcio**, kiu kunigis sub la titolo "Esperanto en Scienco kaj Tekniko" 61 sciencistojn el 15 landoj, elektas la jenan prezidantaron: Prof. D-ro I. Lapenna (Londono), Prof. D-ro Olav Reiersøl (Oslo), Prof. D-ro F. Egami (Nagoya), Prof. D-ro Sirk (Vieno), Kuratoro C. Støp-Bowitz (Oslo).

La raporto de **Prof. Lapenna** prezentas la plurajn aspektojn de la lingva problemo en la scienco.

La sciencaj esploroj ofte suferas pro manko de komuna lingvo. Eĉ se oni povas venki la lingvajn malfacilaĵojn, la perdo de tempo kaj aliaj rimedoj estas vere granda. La persona kontakto inter sciencistoj de la diversaj landoj estas ege limigitaj. Sufiĉas ĉeesti unu solan internacian sciencan kongreson por senti tiun ĉi vere bedaŭrindan fakton. Vere intensaj kaj larĝaj intelektaj interŝanĝoj mankas. La popularigo de la sciencaj akiraĵoj bezonas komunan lingvon. La specialigita scienco devas aperigi verkojn, kiuj pro sia specialeco ne povas aperi en granda ekzemplera nombro eĉ en la grandaj lingvoj.

Pri tiu ĵus konigita situacio konscias ankaŭ UNESKO. En sia baza programo ĝi ofte parolas pri lingvaj malfacilaĵoj. Estas kontraŭdiro inter la celo de la scienco, kiu devas esti universala, kaj la nuna tendenco, kiu postulas, ke la sciencisto aktivadu nur en tiu direkto, kiu povas esti utila por la milita potenco de la ŝtato. Tiu ĉi tendenco malutilas al la scienco kaj samtempe malhelpas la firmiĝon de Esperanto kiel lingvo de la scienco.

Por prezenti al la sciencaj medioj la lingvan problemon kaj la

avantaĝojn de Esperanto kaj ĝian aplikadon D-ro Lapenna faras plurajn sugestojn, kaj atentigas ke oni devas samtempe labori en ĉiuj direktoj, ĉar vane oni verkas en Esperanto, se ne ekzistas sufiĉe da legantoj kaj aĉetantoj; kaj vane oni varbas amason, se ne ekzistas scienca literaturo por ĝia kontentigo.

Post vigla diskuto la kunveno komisiis profesorojn Egami kaj Reiersøl formuli certajn rekomendojn proponotajn al la kunveno en la dua kunsido. Rezolucio direktita al UNESKO estis akceptita.

La **Tria Sekcio** (Intelektaj Interŝanĝoj) okazis sub la prezido de S-ro **J. H. Rosbach**. Sekretario: S-ro Olav Rygg. La Prezidanto prezentas la rezultojn de enketo pri la starpunkto de diversaj grandaj organizaĵoj al Esperanto. Dum la diskuto oni parolas precipe pri Esperanto inter sportistoj, rotarianoj kaj skoltoj.

La **Kvara Sekcio** (Internacia Trafiko kaj Komerco) kunsidas sub la prezidado de **S-ro Petit**. Post raportoj de turismaj aranĝoj de S-roj Lovati, Dupuis, Svantesson, oni decidas pri starigo de internacia turisma asocio kun la nomo "Eŭropa Turismo" por efektivigi vojaĝojn tra tuta Eŭropo kun malaltaj prezoj ankaŭ por ne-esperantistoj.

* * *

Samtempe kun la kvar sekciaj kunvenoj ankaŭ la blindula sekcio kunvenis kaj aŭskultis kun granda atento la—tra la itala radio—tiel bone konatan kaj ŝatatan voĉon de **D-ro Vincenzo Musella**, kiu parolis pri la plej gravaj flankoj de la interpopolaj rilatoj.

La partoprenantoj de la Veterana Kunsido prezentis junan fervoran kaj

veran intereson. La plej valora decido estas la fondo de "Internacia Klubo de Veteranoj". (Veterano estas, kiu minimume 40 jarojn pasigis en la movado). **S-ro M. Lewin** donis informon, laŭ kiu 200 veteranoj vivas, el kiuj 20 partoprenas en la movado jam de pli ol 50 jaroj.




foto : Sune Ahlm

S-ino Noll, Kopenhago, kaj Prof. Rissom, Hamburgo : du el niaj veteranoj.

La Kooperativa Ligo kunsidas sub la prezido de **S-ro Ager** (Londono). **S-ro Kverno**, reprezentanto de la Norvega Kooperativa Asocio, salutas la kunvenon kaj invitas la partoprenantojn al la kooperativa lernejo apud Oslo. Ambaŭ paroladoj faris paralelon inter la idealismaj celoj de la koopera movado kaj Esperanto. Inter la informoj, raportantaj pri la progreso de Esperanto en la kooperaj movadoj, oni aŭdis pri la intereso de la angla, precipe Londona kooperativa asocio, kiu eldonas afiŝojn en Esperanto. Sed ankaŭ en aliaj landoj oni atingis belajn rezultojn, i.a. en Norvegujo.

La Distra Vespero


VESPERE la diversaj riveretoj kaj riveroj de sekciaj kunvenoj, ekskursoj kaj “individuaĵaj entreprenoj” fluigas sian amason al Colosseum, en kies salono ili unuiĝis je iaspeca maro de homoj. Malantaŭ tiu ĉi vespero estas amaso da laboroj kaj sinofero kaj ni tuj menciu, ke **S-ino A. Sletterød** estis konstante en la unua vico.

La programo estas vere riĉa kaj altvalora. Oni ridas, ĝuas, laŭdas kaj aplaŭdas. Eĉ nura registrado de la virtuozaĵoj kaj artaj, interesaj numeroj pretendas tro multe da spaco en tiu ĉi numero, ni do ripetu sen speciala recenzo, sed kun plena laŭdo la numerojn, kiuj sekvas la bonvenigajn vortojn de **S-ro Bj. Ottesen** : **Norman Birkeli**, virtuoza de la t.n. Hardanger-violono kaj talenta komponisto. Ambaŭ liaj numeroj, la naturbildaro pri Norvegujo, komponita de li, kaj la “Danco de la Diablo” de Olle Bull, rikoltas longedaŭran aplaŭdadon. La popoldanca rondo “Peer Gynt” prezentas popoldancojn viglajn kun la sama efiko. **S-roj Stordahl** kaj

Engedahl estas virtuozaĵoj de kanto kaj akordiono de unua rango. **S-ro Alf Hansen** principe ludas muzikon nur per mastrumaj iloj, kiuj al ĉiutagulo ne estas muzikeblaj. Ankaŭ granda sukceso. **S-ro Finn Mehlum** mimikas kaj pantomimas tiel perfekte, ke eĉ Esperanto estis ne-necesa por la komprenigo. Lia lasta numero “Bubo en la kino rigardante sovaĝokcidentan filmon” vigle vivas en ĉies memoro. La disĉiplinetoj de **S-ino Irene Bye-Nielsen** prezentas mirindajn akrobataĵojn, kaj nekonjektitajn fortojn de etaj infankorpoj. Sub la gvido de **D-ro F. Szilágyi** diverslandaj okazaj aktoroj “ludas” esperanto-librotitolojn, pri kiuj kvar sinjoroj kaj same multaj sinjorinoj aranĝas divenkonkurson. Kun minimuma diferenco la sinjorinoj gajnas. Fine Charley-Charley distras nin per Esperanto-ventroparolado.

Estis varma vespero kaj dum la nokto longe aŭdiĝas la internacia lingvo sur la dormemaj stratoj de la urbo.

*Akershus :
mezepoka fortikaĵo
de Oslo
(vidu la Kongresan
glumarkon)*



Nia Diligenta Kolegaro

LA marda tago komenciĝas jam je la naŭa per la kunsido de la sekcioj.

Post la longa programo lunde la publiko iom reduktiĝis eĉ en la **Unua Sekcio**, kies kunsido tamen restas vigla kaj homplena. Oni daŭrigas la diskuton pri la instrumentadoj.

S-ro Keur parolas pri la socia konsisto de niaj grupoj. Li estas komisiita de la Centro de Esploro kaj Dokumentado por esplori la eblojn. Li donas detalan informon pri la necesaj statistikaj laboroj. Ĉiu landa asocio havu konstantan komisiiton por tiu ĉi laboro. Laŭ **S-ro Kennedy** eĉ la unuopaj grupoj devus havi sekretarion por tiu laboro por pli efike trovi laŭ la konsisto de la grupoj la konvenajn kunventemon, instrumentodon kaj libroeldonojn. Pluraj alparolas la temon: laŭ **F-ino Nixon** la statistika problemo grave pliigos la ŝarĝon de la jam tro ŝarĝitaj esperantistoj. **S-ro Campetti** akcentas la neceson pri kunlaboro inter UEA kaj SAT pri tiu ĉi afero. **S-roj Dahl** kaj **Jovanovic** ne konsideras la plej urĝa la statistikan laboron. Sekvas diskutoj denove pri la instruado.

La **Dua Sekcio** havas interesan raporton de **Prof. Egami** pri la malfavora materia situacio de la sciencistoj en la diversaj landoj. La japanaj sciencistoj estas eĉ en pli malbona situacio ol iliaj eŭropaj kolegoj. Ĉe la kolektado de la informoj, kiujn li transdonis al la Japana Scienca Konsilantaro, Esperanto havis gravan kaj impresan rolon. **S-ro Keur** raportas, ke 16 landaj asocioj respondis koncerne la aranĝon de la esploroj kaj

dokumentado kaj pluraj el ili jam faris grandan parton de la laboro. La kunveno varme aplaŭdas ambaŭ raportantojn kaj decidas subteni la laboron de la du raportintoj.

La **Tria Sekcio** faras jenajn decidojn: leteroj estu sendataj al la skolta tendaro en Vaerdal, kaj al la skoltina tendaro en Dombas, al la Unuiĝo Esperantista Franca pri partopreno en la septembra internacia kongreso kontraŭ-alkoholista en Parizo.

En la **Kvara Sekcio** la temo estis "Esperanto kaj Komerco". Al la jam ekzistanta Esperantista Komerca Ĉambro sole en Francujo jam aliĝis pli ol cent firmoj. Oni komisiis delegitojn ankaŭ en Italujo, Svedlando, Belgujo, Nederlando, Germanujo, Danujo, Norvegujo kaj Svislando. Oni proponis ke ĉiu aliĝinta firma venu sur aparta listo en la UEA-jarlibro kaj rajtu disponi pri reklamspaco en la libro. Fine okazas decido pri la estraro de la Eŭropa Turisma Organizaĵo, menciita pli supre, ke ĝia oficiala organo, same kiel tiu de la Esperantista Komerca Ĉambro, estu "Heroldo de Esperanto".

* * *

Apenaŭ finiĝis la sekciaj kunsidoj, kiam la vere prelegmalsata kaj kultursoifa publiko atakas la salonon Cart, kie la simpatia aŭtoro de la "Bagatelaro", **S-ro Johan H. Rosbach**, parolas pri la norvega historio. Plenplena salono, starlokoj, bonege koncentrita prelego pri la bataloj de la norvegoj por la libereco kaj feliĉo.

Inter la prelegoj oni svarmas en la kongresaj kontoroj, en la vestiblo, aĉetas gazetojn, fotografas sur la ŝtupoj de la enirejo, sendas poŝt-

kartojn, transprenas siajn poŝtaĵojn, observadas la “Rendevuan Tabulon”, kie oni vidas nur la kongresan numeron de la serĉoto. La rendevua “dokumento” estas ricevebla ĉe speciala oficisto. Bona kaj diskreta aranĝo. Ni komencas kategoriigi la kongresanojn laŭ siaj agadlokoj: (1) Prelegaŭdistoj; (2) Vestiblistoj, kiuj vivas sian tutan kongresan vivon en la vestiblo kaj antaŭ la Universitato; (3) Ne multaj eksteristoj, kiujn timigas la programriĉo kaj kiuj eskapas al la eksteraj plezuroj kaj propagando.

Nu, ĉiukaze ankaŭ tiu ĉi posttagmezo estas dokumento pri la krea spirito de la esperantistaro. Ne malpli ol kvin fakkunsidoj kaj samtempe eĉ universitata prelego okazas.

Universala Ligo kunvenas sub la prezido de **S-ino J. C. Isbrucker-Dirksen**. Du novaj estraranoj, S-roj O. Svantesson kaj Minnaja, estis elektitaj. La liga laboro laŭ la konstatoj spitas eĉ la feran kurtenon kaj konkreta vigliĝo estas rimarkebla. El la proponoj estas interesa tiu de **S-ro Julin**, ke oni esploru la eblecon uzi Esperanton en ne-esperantistaj kongresoj, laŭ la ideo de D-ro Privat, dum 20-minuta esperantodebato meze de la multlingva publiko, pri iu ajn temo. **S-ro Svantesson** proponas, ke progresoj en ne rekta federalismo, sed ĉe parencaj kampoj estu registritaj en la faka organo. La proponon de la Brita Sekcia pri pli ampleksa kaj intensa informaservo la estraro studos. **S-ino Isbrucker** fine legas klarigan artikolon pri la teorio de la mondfederalismo.

La Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kunsidas sub la prezido de **kaplano L. Thalmaier**. **Paroĥestro F. J. Fischedieck** prezentis la historion




foto: Benny Nielsen

Eĉ inter kunvenoj okazas diskutoj! (de maldekstre) Prezidanto Malmgren, Ĝen. Sek. Goldsmith kaj Estrarano Oliver atentigas la parolojn de Estrarano Lapenna

de la norvega eklezio. Oni sendos salutleteron al la 75-a Germana Katolika Kunveno en Berlino. Katolika diservo kaj fakkunveno okazos venontjare dum la UK en Zagreb.

Kristana Esperantista Ligo havas kunvenon kun preskaŭ 100 partoprenantoj. Prezidas **S-ro E. Carlén**.

S-ro D. Boer prezentis partojn de la jam aperinta jarraporto, kaj konstatas, ke la kontakto kun la neŭtrala movado estas la plej kontentiga. La organo *Dia Regno* pasintjare aperis sepfoje. (Unu el la plej lukse kaj zorge redaktitaj Esperanto-organoj. Rim. de la raportisto). La nederlanda sekcio havas bonan kontakton kun la

kristana nederlanda radio-asocio kaj la sekcio ĉiumonate disponas pri kvaronhora prelego sub la rubriko "La Evangelio per Esperanto". Verŝajne la nederlanda parlamento decidis pri la propono registara pri la instruado de Esperanto en la elementaj lernejoj.

Laŭ la raporto de la sveda sekretario, **S-ro K. O. Sandgren**, la movado bone progresas ankaŭ en Svedlando. **S-ino Anna Alamo-Sandgren** post la komenco de 1947 faris pli ol 100 prelegojn. Kursoj estis aranĝataj. La sveda sekcio havas bonan kontakton al la sampensulaj gravuloj kaj presorganoj. Pere de Esperanto oni starigos evangelian mision en Japanujo. Ankaŭ la plej juna sekcio, la svisa, raportas pri vigla agado. La estraro konsistas el: E. Carlén (Svedlando), Prezidanto, D. de Boer (Nederlando), Sekretario, Karin Larsson (Svedlando), kasistino, W. J. Downes (Britujo), Paul Hübner (Germanujo), K. Dabezies (Francujo). Revizoroj: S-roj H. Lundin kaj G. Rönneŝtam (Svedlando).

La propraĵoj de la organizaĵo estas 3000 kr. svedaj. La Evangelia Kantaro baldaŭ aperos.

La Filatelista Kunsido prezentis viglan raporton pri membroj en 22 landoj, servoj filatelistaj, pri bone redaktita revuo k.c. Raportanto estas **S-ro Ingemar Nordin**.

La kunsidon de ISAE (Sciencistoj) partoprenis 27 personoj el 13 landoj sub la prezido de **S-ro Støp-Bowitz**. Aprobataj jarraportoj kaj diskutoj pri organizo kaj kunlaboro kun aliaj organizaĵoj. Jam antaŭtagmeze 25 sciencistoj kaj inĝenieroj el dek landoj partoprenis ekskurson al la Urania Reaktoro en Kjeller, apud Oslo. Nederlanda kaj norvegaj funkciuloj klarigis la principojn de tiu ĉi aparato,

kiu servas por utiligi la atomenergion.

* * *

Denove ni estas ĉe la Somera Universitato: **Prof. Emil Smith** estas malnova esperantisto, kiu dum longaj jaroj, eble jardekoj, ne havis okazon okupi sin pri Esperanto. Despli agrable estas noti la fakton, ke la maljuna profesoro sen ies lingva helpo povis produkti tre bonlingvan kaj interesan prelegon pri la naskiĝo de la Blanka Homo—origino de la eŭropa kulturo. La tempospaco de la esploro estis tre ampleksa: li parolis pri la prahindeŭropanoj kaj ilia kulturo kaj atingis la malfruan roman tempon. Pri rasoj li ne kredas. Ni ĉiuj estas egalvaloraj bastardoj. La konkludo de la profesoro estas: La "Blanka Homo" estas ludinta gravan rolon en la dramo de la historio, sed nun li estas mortanta. "Mi ne konsideras plu diverskolorajn rasojn, sed mi esperas pri 'homo sapiens', la supernacia, bonvolema, humana homo".

Ankaŭ la universitata prelego de **Prof. Pastro W. H. Harris** vekis grandan intereson. La temo estis la keltaj popoloj kaj lingvoj, pri kies historio kaj karakterizaĵoj la preleganto donis gravajn informojn. La nuntempa stato estas, ke kvar el la iamaj lingvoj vivas aŭ reviviĝas, sed la estonteco pro la deviga supereco de la angla kaj franca lingvoj estas necerta. Sed oni klopodas konservi la lingvajn kaj etnologiajn tradiciojn. Ĉiujare oni aranĝas i.a. "Keltan Kongreson" por la diversaj keltaj lingvogrupoj, kie oni pritraktas keltajn aferojn—pro manko de komuna lingvo—en la angla lingvo! Oni revas pri "komuna kelta interlingvo" sed oni ne atentigas la Internacian Lingvon, kiu solvus la problemon.

La Arta Vespero—Unike Bela

NI estas meze de la Kongreso ; la impreso pri la Kongreso kaj la ĝenerala opinio pri la esperantistoj estas la plej bona. La eksterlandanoj en tiu ĉi granda turisma centro ne vekas iaspecan kolosan atenton, eĉ ne nia el ĉiuj vidpunktoj kolorriĉa indonezia samideanino, sed oni rimarkas, ke tiu ĉi multlingva amaso tamen parolas—ne balbutas—unu lingvon. Ni kredas pri forta impreso ĉe la norvegoj.

La arta vespero, pri kies aranĝo **S-ro M. Stuttard** kaj **S-ro Schjerve** majstris, estis unu el la plej neforgeseblaj dum la kongreso. La vespero estis dediĉita al la norvega artkulturo kaj la prezentantoj digne plenumis sian taskon. La tuta vespero estis sense kaptebla renkontiĝo inter diversaj kulturoj : oni satoriĝis de la travivaĵo, kiam la tonoj kaj voĉoj de la norvega kulturo solviĝis al la reprezentantoj de la internacia kulturo. Ĉiuj numeroj reprezentis altan nivelon : la orkestraj komponaĵoj de R. Nordraak same kiel la 3a Rapsodio de J. Svendsen kaj komponaĵoj de O. Bull. Aŭskultante la tri kantojn de **S-ino Sirkka Lehtivaara** ni denove ĝuis la unike delikatan kaj klaran teksto-elparolon de la bonega kantistino. Kiu povus

forgesi la majestan melodraman prezentadon de **S-ro G. Assland** el Peer Gynt kaj ĝian bildoplenan muzikakompanion. Fiksitaĵoj al la seĝoj ni glutis la klarajn vortojn de la pastra parolado el la dramo—de la komencaj vortoj :

*Nun dum la juĝo la animo pasas,
kaj karnon kvazaŭ kavan ŝelon
lasas,—*

*nun, karaj miaj, nin kunigu vorto
pri la mortinto, lia tera sorto . . .*

ĝis la lastaj versoj, kiuj serĉas komprenon al la kampulo, granda laŭ sia maniero :

*Malbona civitan',—por ŝtato, eklezio
li estis arbo vana. Sed kun sem'
ĝermanta monte, kaj kun familio
li grandis, ĉar li estis nur si mem.*

La publiko entuziasme aplaŭdis la potencon deklamon kaj ankaŭ la modesta, virtuoza tradukisto de Peer Gynt ricevis tondrajn aplaŭdojn. Vi scias lian nomon, kompreneble : **Erling Anker Haugen**. **S-ro Merrick** prezentis per pura, kristalklara, virtuoza maniero Sonaton (No. 7) de E. Grieg, kaj aldone la “Baladon de la Ribelo” de H. Saeverud. La orkestro finis la unike belan vesperon per *La Espero*.

Post Ekskursiva Vago—Jen Tago de Ago

MERKREDE la plej granda parto de la kongresanoj ekskursas al diversaj direktoj kaj eĉ la kaprica vetero favoras tiun tagon ; la fjordveturo, la ekskurso al Kongsberg kaj la aliaj ekskursoj plenigas la grupojn per ĝuo kaj

plezuro. Centoj, multaj centoj admiras la majestan norvegan naturon.

Merkrede vespere KELI aranĝis vesperon destinitan al la kredo, kiun partoprenis ĉ. 120 personoj.

Ĵaŭde la estraro de UEA havas kunsidon kun la reprezentantoj de la fakaj asocioj.

Sub la prezido de **S-ro Alfred Tucker** okazis Pacifista kunveno. Ĉeestis 64 personoj. La diskutoj okazis pri la problemoj de la civila militservado, kiel penetri tra la fera kurteno (laŭ informoj blinduloj, brajle skribantaj ricevas respondojn), pri la taskoj de la pacifistoj. La rezolucio de la kunveno deklaras, “ke la milito estas krimo kontraŭ la homaro; ni do firme decidis ne subteni ian ajn militon, sed penadi forigi ĉiujn kaŭzojn de milito, kaj ni opinias ke la plej bona metodo tion fari, estas la konstanta uzado de Esperanto”.

Cetere je la deka horo oni konstatis, ke estas samtempe prelego de Prof. Egami, kunsido de la Akademio, Oratora Konkurso, kunveno de sciencistoj, kunsido de ĵurnalistoj, kunveno de instruistoj, poste de Rotarianoj, spiritistoj, filatelistoj, vivreformuloj, kaj fine oni ĵetas kubon kaj laŭ ties kaprico oni surteriĝas en la plej altaj regionoj de la Akademio. Tiu ĉi kunveno kolektis sep akademianojn, kiuj sub la prezido de **S-ro J. R. G. Isbrucker** vigle diskutis pri lingvaj detaloj. La Prezidanto proponis aranĝon de publikaj kunvenoj dum la estontaj kongresoj, kie la akademianoj respondos pri lingvaj problemoj. Detaloj pri tiu aranĝo sekvos poste.

TEĴA (Ĵurnalistoj) havis sian 6an internacian konferencon en la sama tempo. Ĉeestis ĵurnalistoj el 10 landoj, i.a. el Indonezio. **Red. Einar Adamson** el Gotenburgo bonvenigis la ĉeestantojn. Oni kompletigis la estraron per O. Thormodsen (Haugesund). Estis decidite, ke la membrokarto estos aliformata je legitimilo.

Kunveno de Rotarianoj okazis ankaŭ ĵaŭde. Aperos listo de ĉiuj konataj Esperantistaj Rotarianoj. **S-ro Lewin** anoncis, ke la raporto pri la nuna kunveno aperos en la brita Rotaria gazeto.

ISAE (Sciencistoj) havis sian duan kunsidon kaj pritraktis kunlaboron kun la Akademio pri terminologiaj vortaroj, k.c.



foto : Sune Ahlm

D-ro Lapenna disdonas la premiojn al S-ro N. Minnaja, F-ino I.-M. Adamson kaj F-ino H. Lanka pro la Oratora Konkurso.

Oratora Konkurso okazas antaŭ granda publiko. La juĝa komisiono konsistas el tri membroj: **Prof. Lapenna**, **S-ino Kennedy** kaj **S-ro Morariu**. Ankaŭ la premiitoj estas tri: **S-ro Nicola Minnaja** el Romo, **F-ino Inga-Maj Adamson** el Göteborg kaj **F-ino Hella Lanka** el Hamburg, kun minimuma diferenco inter la lastaj du. Libropremioj kaj 100 svisaj frankoj kaj diplomoj ĝojigis la gajnintojn, kiuj per 50, 30 kaj 20 frankoj—laŭ sia grado—riĉigis sian privatan kongresan kason.

Ni vidis lumbildojn pri la pitoreskaj fjordoj, akvofaloj kaj montregionoj de Norvegujo kun same pitoreskaj etnografiaj tipoj. Gvidanto de tiu ĉi agrabla veturado estis **S-ro Gunnar Raabe**.

Tiu ĉi riĉa ĵaŭdo! Je la 11.30a horo **S-ro M. Stuttard** malaperas el la sekretario kaj kuras al la salono Cart, kien ĉiuj ĉeestantaj kongresanoj instinkte sekvas lin. La fakto en si mem ne estus tiel rimarkinda, se la temo de la multflanka kongresa sekretario ne estus havinta la titolon "*Horeto de Poezio*". Oni ne povas ĝenerale plendi, ke nia diligenta kolegaro neglektus ĉiujn aliajn temojn pro la poezio. Tamen, post la prelego de S-ro M. Stuttard eĉ la nepoeziemuloj varbiĝis al la poezio. S-ro M. Stuttard akceptu la dankojn de ĉiuj poetoj de Esperantujo. Poezio



Mason Stuttard :

La Konstanta Kongresa Sekretario

estas por la oreloj. La evoluo de la presarto detruas la poezian senton de la homoj. Oni devas aŭdi la poemojn, laŭ la ideo de la preleganto, kun komentoj. La poemoj de bonaj esperanto-aŭtoroj kune kun la klaraj komentoj vekas veran intereson.

Tre sukcesa eksperimento, kiun atestas ĉ. 200 esperantistoj!

Belartaj Konkursoj

LAŬ la komizio de la juĝantaro (Prof. Waringhien, akademiano, D-ro F. Szilágyi, akademiano, S-roj R. Rossetti, Sekretario, E. A. Haugen, K. R. C. Sturmer, kaj Roger Bernard, kiu juĝis nur pri la proza parto) F. Szilágyi gvidis la solenan kunvenon, okazintan la saman ĵaŭdon posttagmeze.

Jen tabelo pri la decido de la juĝantaro:

Originala Poezio—1a premio: **John Francis**, Skotlando (*Al Malfruaj Solenantoj*); 2a premio: **Eli Urbanova**, Ĉeĥoslovakujo (*En Arbaro*); 3a premio: **Jiri Kořinek**, Ĉeĥoslovakujo (*Meditado*).

Tradukita Poezio—1a premio: **William Auld**, Skotlando (C.

Sansom: *Maria de Magdalo*); 2a premio: **Roger Bernard**, Francujo (R. Carlès: *Tenereco*); 3a premio: **J. S. Dinwoodie**, Skotlando (G. Herbert: *Disciplino*).

Originala Prozo—1a premio: **D. Richardson**, Usono (*Rosario*).

Tradukita Prozo—1a premio: **E. Lane**, Anglujo (J. Conrad: *Ŝipo en Morta Danĝero*); 2a premio: **Societo Esperantista Mulhouse**, Francujo (Cronin: *La Kuracisto de Lennox*).

Originala Dramo—1a premio: **Eileen de B. Daly**, Anglujo (*Taso da Teo*); 2a premio: **Marjorie Boulton**, Anglujo (*La Marfundo*); 3a premio: **Ewart Clark**, Anglujo (*Brikoj kaj Mortero*).

Tradukita Dramo—la premio: **C. Ritterspach**, Germanujo (Meissinger: *La Ŝanco*).

Honorajn menciojn ricevis en la diversaj branĉoj: J. Dinwoodie, pro la originalaj poeziaj konkursaĵoj *Senmorteco*, *Maljuno* kaj pro tradukita poemo (*Elektra* de Herbert); J. Kořinek (Vrchlicki: *Hakon*); kaj W. Auld (J. Lehmann: *Penetri Tiun Ĉambron*). Ankaŭ la du lastaj pro poezia traduko; E. de B. Daly pro la originala dramo *La Konkurso*. Kun merita mencio distingis la juĝantaro la jenajn konkursaĵojn:—Originalaj poemoj: John Francis—*Lageto*; Eli Urbanova—*Nimfoj*; L. Laurat—*Junedeno*; W. Auld—*Memoro*. Inter la tradukitaj poeziaĵoj same distingis la komisiono la Dante-tradukon (*Purgatorio*, 1-a kanto) de V. Musella el Romo; la jenajn originalajn rakontojn: E. de B. Daly—*Vengŝo*; Frank Halls (Aŭstralio)—*Mia Unua Publika Parolado*; M. Boulton—*Via Ministra Moŝto*. Same el la tradukitaj prozaĵoj: Couperus—*La Binoklo* (trad. de Betsy Leopold, Nederlando); el la originalaj dramoj la verkon de Emilja Lapenna, Jugoslavujo—*Galerio de Fiecoj*; kaj fine el la tradukitaj dramoj la tradukon de verko de Bastian—*Nigra Kafo*, tradukita de Albert Lienhardt, Francujo.

Du kluboj, la Londona Esperanto-Klubo (5 pundoj) kaj la Esperanto-Klubo en Oslo (100 norv. kronoj) grandanime pridonacis la konkurson, same S-ro Gino Catarzi donacas krome po 10000 italaj liroj al la ĉefgajnintoj en la branĉoj originala kaj tradukita poezio. Tiuj specialaj premioj, donitaj jam la duan jaron de S-ro Catarzi, nomiĝas la Laŭro

“Esperanto” kaj Laŭro “Zamenhof” de la Poezia Konkurso Paneŭropa.

La detalaj raportoj pri la proza kaj poezia sekcioj sekvos en posta numero.

Prezentantoj de la premiitaj verkoj estis **S-ino M. Colliander**, **S-ino S. Carrfors**, **S-roj P. Thorsen**, **F. Azzi**, **F. Kvalvag**. La plej fortan impreson faris la senkostuma prezentado de la gajninta dramo. Prezentado de ĉeestantaj aŭtoroj kompletigis la programon.

* * *

Iom poste deksep diverslandaj infanoj kaj multaj plenaĝaj infanoj ĝuas horeton de ludoj, konversacio, kanto, dancoj—franca kaj nederlanda. La juna generacio ŝajne estis kontenta kaj la eksperimento ripetinda.

El la ceteraj programoj ni menciis la filatelan ekspozicion de tiu ĉi tago kaj la kunvenon de la Esperanto-Spiritista Societo. **S-ro H. W. Holmes** prelegis por 30 aŭskultantoj pri la rolo de Esperanto en la psika esploro.

* * *

Kvar bonegaj SU-prelegoj pri variaj temoj plifortigas la speciale kulturan aspekton de tiu ĉi tago. **Prof. F. Egami** el Nagoya parolas pri la neorganika biologia kemio de nitrogeno, **Prof. Hugo Sirk** el Vieno pri la t.n. Browna movado de mikroskope videblaj solidaj partikloj, ŝvebantaj en fluidaĵo. Vespere **Prof. Lapenna** prelegas antaŭ plena aŭlo pri nova kategorio de internacia krimo, pri la t.n. genocido, t.e. krimoj kontraŭ la ekzisto de naciaj, rasaj, religiaj aŭ etnikaj grupoj. Lia konkludo estas, ke la nuna protekto

kontraŭ tiuj krimoj ne sufiĉas. Post la prelego de Prof. Lapenna, prezentita per fortimpresa vervo, sekvas—jam en la malfruaj horoj—la eksterordinare klara, instrua prelego de dana sciencisto **P. Neergaard** pri

la nigra grenrusto, kaŭzo de katastrofoj en agrikulturo. La prelego prezentas la dramatan streĉon de la biologia esplorado en sensiga maniero kaj la prelegon sekvas demandoj kaj informoj.

Pri Gastoj en la Geedzeco—Regalo en la Balo

VENDREDO. Oni estas kompreneble laca pro laŭprogramaj kaj eksterprogramaj aferoj, sed eĉ se niaj langoj pendus kiel tiuj de lacaj hundoj, volonte ni plilongigus la semajnon. Tamen vane! Ni jam estas ĉe vendredo kaj se ni havas momenton pensi pri io dum la kurego kongresa, ni melankolie rigardas al la griza ĉielo kaj volonte akceptus iun novan Josua, kiu povus haltigi la nevideblan sunon.

La tago komenciĝas per la Dua Ĝenerala Kunveno, kiun prezidas **S-ro E. Malmgren**. Sekvas la raportoj de la sekciaj prezidantoj kaj tiuj de diversaj fakaj asocioj.

La kunlaborantoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA kaj la reprezentantoj de la Informaj Fakoj kunvenas antaŭtagmeze. Prezidas **Prof. Lapenna**. Prielekto de komuna devizo oni diskutas, i.a. oni rekomendas la devizon de la sveda movado, aperantan en diversaj atentovekaj formoj, laŭ kiu devizo: “*Se ĉiuj lernus Esperanton nun, la popoloj de la tero post du jaroj povus sen malhelpo interkompreniĝi.*” Oni utiligu iun el la aperintaj devizoj (*Esperanto*, julia numero) laŭ la cirkonstancoj.

Pri la facileco de Esperanto oni diru, ke ĝia ellerno pretendas dekonon ĝis kvinonon de la tempo bezonata por ellerni nacian lingvon.

Por informado de ne-esperantistaj kongresoj la landaj asocioj utiligu la cirkuleran leteron de UEA (ankaŭ en la angla kaj franca).


(Mallonga rimarko de via raportanto: CED funkcias modele. Helpu ĝin por atingi eĉ pli belajn rezultojn).

La prinorvegaj prelegoj altiras daŭre grandan publikon; precipe la norvega muziko interesas la kongresanojn, kiuj amase aperas por aŭskulti **S-ron G. Aasland**, kiu esploris la kunligon de la popola muziko al la verkoj de la plej grandaj norvegaj komponistoj. Kantoj kaj muzikoj ilustris la bonegan prelegon. Same instrue kaj agrable efikas la prelego de **S-ro Rykkvin** pri la norvega literaturo.

Okazas kunveno de KELI sub la gvido de **L. Vasiljef** kaj ankaŭ la Bahaa-sekcio havas kunvenon, pritraktantan la aplikon de Esperanto en la Bahaan movadon. Lingvanoj de la finno-ugra grupo, estonoj, finnoj, hungaroj havis vendrede varmhumoran kulturan kunvenon.

* * *

Oni povas ekscii multe da interesaĵoj pri tiel, ŝajne tute nekomplika vermo, kiel la lumbriko, se unuaranga fakulo kaj interesa prelegisto prezentas la temon. La prelegon de **S-ro Støp-Bowitz** granda publiko aŭskultas. Ankaŭ la lasta



Kliŝo : Vojaĝtrafik-Asocio de Oslo

La nova urbdomo, kie okazis la Kongresa Balo

prelego de SU logas grandan, eĉ grandegan publikon. La ekzotika preleganto, **S-ino Rankajo Ch. Datoe Toemenggoeng** en tre facila maniero, amuze kaj instrue konigas la socian pozicion de la virino en Indonezio. La socia sistemo klare bazas sin sur la virinoj, ĉefe sur la rajtoj de la patrino. La prelegantino tre kontentigas la ĉeestantajn sinjorinojn per la rakonto pri la indonezia geedzeca sistemo, en kiu oni kvazaŭ aĉetas la edzojn kaj ili estas konsiderataj dum la tuta geedzeco kiel gastoj en la domo, kun la rajtoj kaj rajtminusoj de gasto. Hm, hm—oni volas diri, sed la prelegistino samtempe jam frapas nin per la argumente forta indonezia proverbo: “Ne la koko metas la ovojn”. Tre interesa prelego kun multaj informoj pri la lando.

Vendrede vespere la urbo Oslo regalias la kongresanojn. Kia regalo ! La nova urbdomo de la 900-jara urbo naĝas en lumo. La belega grandioza halo estas ornamita per siaj eternaj ornamaĵoj, kolonoj kaj murpentraĵoj, gigantaj kaj grandiozaj, kun temo el la naturo kaj el la historio de la urbo, kaj per aktualaj ornamaĵoj por la regalo kaj la Internacia Balo. El la belega salono kie ni gastoj bonapetite kaj senbare manĝas, trinkas kaj fumas ni vidas al la haveno, kaj al la fjordo. Al tiu direkto morgaŭ ni iros, sed hodiaŭ ni festu ! La kongreso denove havas okazon—nun sidante ĉe bele dekoritaj kaj riĉe provizitaj tabloj, aŭdi senriproĉan esperantlingvan paroladon de **Urbestro Brynulf Bull** :
 “Estas granda honoro kaj ĝojo por mi, ke mi povas bonvenigi la parto-

prenantojn de la Esperanto-kongreso ĉi tie en la Urbodomo . . . Nun mi limigas min al esprimado de la espero, ke la kongreso ĝis nun sukcese pasis kaj ke vi profitos el la restado en Oslo.

“En tiu ĉi Urbodomo ni ofte akceptas reprezentantojn el la diversaj landoj de la mondo, kaj ni sentas de proksime la problemojn, kiujn kreas la lingva diverseco. Estas tamen la unua fojo, kiam oni en ĉi tiu Urbodomo parolas Esperanton. Ni salutas ĉi tiun eventon kun ĝojo”.

En la daŭrigo la Urbestro mencias kelkajn detalojn pri la konstruado kaj inaŭguro de la Urbodomo en 1950, kiu dato koincidas kun la 900-jara jubileo de la urbo.

La Prezidanto de UEA, S-ro E. Malmgren, dankas la malavaran kaj gastamegan akcepton, kiu en tiu ĉi pompa kaj rava medio metas kronon al tiuj belaj spertoj kaj travivaĵoj, kiujn la kongresanoj havis. Alvenis la dankotelegramo de la reĝo. La Kongreso ekdancas en la giganta halo, sur kies muroj inter pli heltonaj pentraĵoj ankaŭ la malĝojaj tagoj de la naziista okupo estas eternigitaj. En la halo estas rotacianta amaso da gajaj koloroj kaj frataj homoj, kiuj kunvenis “en la nomo de io granda”, kiuj nun transdonas sin al la facilaj ritmoj de la danco, al la eternaj lingvoj de la rigardoj kaj rideto, kies vojon nun Esperanto jam estis glatiginta. Rigardante desupre de la galerio la vidaĵo de la gaja, per multe da popolkostumoj flora homamaso estas tre impresa kaj optimismiga. Fotografoj estas en agfebra funkcio. Ĵus oni fotografis Ges-rojn T. Ericson, kiuj en Munkeno dum la Kongreso gefianĉiĝis kaj ĉijare dum la Kongreso ili geedziĝis. Kun intereso ni atendas la Kongreson en Zagreb !



foto : Benny Nielsen

La Urbestro de Oslo ĉe la Balo

Sekvas rapida danco. Desupre mi rimarkas, ke unu el la altstaturaj, emfazitaj verdaj kavaliroj atingas la kulminon de sia emfazo kaj ne ŝparante penon, malaltigas sin al la nivelo de la malpli alta kundancantino kaj jen okazas kiso, kiun krom la donanto kaj ricevanto nur la raportisto rimarkas sur la galerio. “*Mi povas diri al neniu, jen diru tion mi al ĉiu !*”

Rapide flugas la vespero per la flugiloj de la muziko, rido kaj danco kaj kiam ni finas, malfrunokte, ni trovas la tutan taksiaron de Oslo antaŭ la granda enirejo. Ĉar pluvegas, je la ĝojo de la ŝoforoj. Oni rigardas sian monujon. Kiom restas el la valutdekrete permesita monprovizo ?



*La kolorsimfonio de la
Kongresa Balo en la
urbodomo*

foto : Sune Ahlm

Sabate je la naŭa la Aŭlo estas plena. La Kongreso tudas kaj ternas —kaj fermas . . . Rustaj voĉoj fermas la Kongreson . . .

Post la malfermo la Prezidanto, **S-ro E. Malmgren**, proponas dankesprimojn sendotajn al la urbestro pro la neforgesebla akcepto en la Urbodomo, pri kio ĉiu plenanime konsentas. . Li anoncas, ke la konkurso inter la landaj asocioj gajnis lastjare Brazilo, kie la diversaj instancoj tre favoras Esperanton. **S-ro Mello e Souza** (Brazilo) dankas en la nomo de la brazila esperantistaro.

S-ro Oliver raportas pri la laboro de la Estraro kaj Komitato de UEA, kaj pri ties plezuro bonvenigi post longedaŭra kaj serioza malsano la revenon de nia ŝatata Prezidanto, S-ro Malmgren (tondra aplaŭdo). Krome li esprimas sian kontenton

pri la ĝis nun senekzempla fakto, ke la estraranoj povis eĉ partopreni la kongresajn aranĝojn. En sia raporto i.a. li anoncis, ke *Esperanto* aperos en novembro kun paĝonombro 48. En tiu numero aperos unu el la someruniversitataj prelegoj. Simile ampleksaj numeroj aperos ankaŭ poste, se sufiĉe multaj novaj aliĝoj alvenos.

Laŭ la decido de la Komitato, **S-ro Teo Jung**, la ĉefredaktoro de *Heroldo de Esperanto*, estas elektita kiel honora membro de UEA. Pri tiu decido ĉiu esperantisto estas sendube tre kontenta.

La rektoro kaj la administranto de la Somera Universitato, **Prof. Reiersøl** kaj **Prof. Lapenna**, ricevas siajn meritajn dankojn kaj aplaŭdojn pro la varia kaj valora aranĝo.

Prof. Lapenna kaj poste D-ro Szilágyi petas la gajnintojn de la

Oratora kaj la Belarta Konkursoj transpreni la diplomojn el la mano de la Prezidanto, kiu siaflanke dankas la du komisionojn pro ilia granda laboro. F. Szilágyi ankaŭ ĉifoje akcentas, ke la belarta konkurso kvante kaj kvalite montris gravan progreson. 109 validaj konkursaĵoj!

Kaj jen varmaj dankoj fare de la Prezidanto al LKK, sub la sperta gvidado de **S-ro Støp-Bowitz** pro la brila Kongreso, al la diversaj bonege funkciantaj servoj, gazetara, poŝta k.t.p., al **S-ro M. Stuttard** pro la streĉa kaj grava laboro dum la tuta jaro. **S-ro Støp-Bowitz** esprimas sian ĝojon pro la sukceso de la Kongreso, kies unu detalo, t.e. la vetero, ne funkciis kontentige. Li petas pardonon . . . Li dankas siajn en- kaj eksterlandajn kunlaborantojn. **S-ro Karterud** salutas kaj dankas en la nomo de la Blindula Kongreso.

D-ro Borovečki, Prezidanto de la LKK por la 38-a UK en Zagreb, invitas la ĉeestantojn al la multpromesa Kongreso en la kroata ĉefurbo.




foto : Sune Ahlm

D-ro I. Borovečki salutas "Bonvenon al Zagreb 1953".

S-ro Kennedy esprimas la dankojn de la kongresanoj al nia simpatia, komprenema, laborema kaj celkonscia Prezidanto, S-ro E. Malmgren.

Ĉiujn varmajn dankojn akompanis spontanaj uraganoj de aplaŭdoj.

Jena rezolucio estis akceptata :

"La 37a Universala Kongreso de Esperanto, en Oslo, apelacias al la oficialaj instancoj, naciaj kaj internaciaj, serioze kaj sen teoria antaŭjuĝo studi la praktikan solvon de la problemo pri Lingvo Internacia, kiun prezentas la lingvo Esperanto.

"Ĝi asertas, ke Esperanto, kiu pro siaj simplaj gramatiko kaj konstruo, estas facile lernebla, bone taŭgas por ĉiaj lingvaj bezonoj de la internacia vivo.

"Tiun nian aserton ni submetas al ĝenerala esplorado. Nur per observado pri la funkcio de Esperanto en kongresoj kaj konferencoj kaj ankaŭ per scienca esploro de la aperinta literaturo la problemo povas esti prijuĝata.

"Universala Kongreso de Esperanto komisiis al la Universala Esperanto - Asocio ĉiel akceli la studojn pri la funkcio de Esperanto, invitante objektivajn observantojn al ĉiuj estontaj kongresoj kaj konferencoj".

La fakaj rezolucioj kaj rekomendoj de la sekcioj, akceptitaj dum la ferma solena kunsido, aperos pro manko de loko nur en venonta numero.

Per tio finiĝas la tagordo. La Prezidanto frapas per sia klabo, denove ni kantas la "Esperon" kaj la 37-a Kongreso jam apartenas al la historio de Esperanto kaj al la arĥivo de ĉies belaj memoroj. Ni turnas malrapide nian rigardon al Zagreb.

F. Szilágyi.

Hans Jakob :

Solena Inaŭguro de la Monumento honore je D-ro Zamenhof, en Wörgl, Tirolo

LA idilia urbo Wörgl en lando Tirolo, distance 60 kilometrojn de Innsbruck, havis du tagojn vivplenajn, okaze de la inaŭguro de la monumento honore je la kreinto de Esperanto. Jam sabaton, la 26-an de Julio alvenis multaj gastoj, en- kaj ekster-landaj, kaj en la stratoj de la urbo aŭdiĝis la sonora lingvo internacia miksata kun la agrable-mola german-tirola idiomato. Grandaj afiŝoj ĉie anoncas la okazaĵon, kaj multaj domoj elmetis flagojn.

Sabate vespere granda surprizo. Muziko tra la stratoj ĝis la stacidoma placo, ornamita de grandaj flagoj diversnaciaj. Ĝin sekvis 'Folkloro Vespere', tirolaj kantoj kantitaj de ĉarmaj knabinoj vestitaj en naciaj kostumoj, pantomimoj de junuloj, dancoj kaj deklamoj. La vasta salono de la hotelo "Alte Post" estis plena; ĉeestis ankaŭ multaj fremduloj altiritaj pro scivolemo. La organizantoj kaj la plenumantoj de tiu ĉi efektive bela vespero rikoltis merititan dankon de la ĉeestantaro.

La inaŭguron de la monumento antaŭis la akcepto de la Landestro (Landeshauptmann) de Tirolo, Sinjoro Josef Anton Mayr, komisiita de la Kanceliero D-ro Figl, por lin reprezenti. Sekve de operacio okazinta la 26/7, la Kanceliero ne povis plenumi sian intencon inaŭguri la monumenton. Post interŝanĝo de bonvensalutoj, sekvis la pontifika meso, celebrata de Prelato Hieronimo Triendl, Abato de la monakejo Wilten, sekvita de la Schubertmesse kantita en Esperanto, kaj de prediko

dulingva farita de bone konata samideano, pastro Ludoviko Thalmaier el München.

Nia elokventa samideano Thalmaier tre bone sciis ligi la universalecon de la eklezio kun la ideo universala de nia movado kaj montri per trafikaj ekzemploj.

Antaŭata de muzikistaro, la partoprenantoj sin direktis al la Stacidoma Placo. Iniciatinto S-ro Hans Steiner kaj la nelacigebla kaj laŭvide rejuniĝinta Hofrat Steiner tre bone organizis tiun ĉi solenaĵon. Zorge skribita dokumento dulingva, kun la ŝtata sigelo kaj subskribo de Sinjoro Kanceliero, de la Landestro de Tirolo kaj de diversaj Ministroj, de la Ĉefepiskopo de Vieno, D-ro Innitzer, kaj de la Urbestro de Wörgl estis montrita. Ĝi troviĝas sub la monumento en la soklo en metala ujo.

Kortega Kons. Steiner salutis kiel honorprezidanto de la monumentkomitato la grandnombran ĉeestantaron. Poste la loka Steiner, iniciatinto kaj unua prezidanto, skizis la evoluon de la ideo de la starigo de monumento, dankis al ĉiuj kiuj bonvolis helpi (iliaj nomoj troviĝas en la Fonda Akto citita) kaj transdonis la parolon al Sinjoro Landestro, kiu per konvenaj vortoj pruvis, ke li tre bone komprenas la ideon de internacia lingvo. La akceptis la monumenton en la nomo de la Aŭstra Registaro, kiu lin delegis por tiu ĉi ceremonio. Post tiuj vortoj li deprenis la flagon, kovrintan la buston de D-ro Zamenhof. Alparolis la ĉeestantaron Sinjoro Emilien Provost, reprezent-

anta la Francan Okupacian Aŭtoritaton ; lin sekvis la prezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio, Eksministro D-ro Frenzel (en flua Esperanto), kaj por Universala Esperanto-Asocio parolis Estrarano Hans Jakob, finante la vicon. Mal-longaj salutoj de delegitoj el diversaj landoj, Francujo, Germanujo, Italujo,

Nederlando, Egiptujo, Svislando, Trieste, finis tiun ĉi parton.

Per bonelektitaj vortoj, Urbestro Kom. Konsilanto Martin Pichler, afabla blankharulo, akceptis sub la gardon de Urbo Wörgl la monumenton ; lin sekvis la skulptisto Theodor Ohnesorge, kiu videble emociigita dankis por la komplimentoj



foto : Max Porsche

de dekstre :

*pastro Ludwig Thalmaier, predikanto kaj festparolanto,
distikestro D-ro Riccabona,
fakinstruistino Herma Haselsteiner,
prelato Hieronymus Triendl, abato de monakejo Wilten,
kort. kons. Hugo Steiner, honorprezidanto,
iniciatinto Hans Steiner, unua prezidanto,
Theodor Ohnesorge, skulptisto de la Zamenhof-busto,
Landestro de Tirol, Josef Anton Mayr,
(blankharulo) prezidanto de Tirola Parlamento, urbestro de Wörgl, Komerca kons.
Martin Pichler,
F-ino Therese Kainer, urba oficistino,
S-ro Franz Feiersinger,
S-ro Hans Jakob, Estrarano de U.E.A., Redaktoro de "Esperanto",
S-ro Emilien Provost, ĉefo de la francaj trupoj de Kitzbühel,
Raimund Cech, afergvidanta prezidanto de Aŭstria Esperantista Federacio.*

al li faritaj.

Plej ĉarmaj estis la du infanoj starantaj apud la monumento : Hansi Steiner (filo de Hans Steiner) kaj knabino Elfriede Messerer, kiuj ambaŭ en tirola kostumo deklamis fest-poemon, kun konvinko kaj certeco. La du infanoj rikoltis la plej fortajn aplaŭdojn.

La ceremonion finis la himno *La Espero*.

* * *

Posttagmeze okazis prezento de filmo (Kvaron-jarcento de la Internacia Esperanto-Muzeo) germanlingve klarigita de Kortega Konsilanto Hugo Steiner. Interesa prezentado por ni Esperantistoj vidi la sinsekvon de la Steiner-ideo starigi tiun ĉi muzeon kaj la Panteonon de Esperanto.

Por kroni ĉion kaj por digesti ĉion kion oni aŭdis kaj vidis, ekskurso en aŭtobusoj kondukis la partoprenintojn al la grandioza regiono de la Kaisergebirge (Imperiestra

Montaro). Ĉion finis Amuza Vespero kun dancado ĝis meznokto.

* * *

Ĉu necesas akcenti, ke la organizantoj de tiu ĉi manifestacio meritas nian plej varman dankon ? Nur unu deziron oni povas formuli : ke nia ŝatata Hofrat Steiner kun siaj kapabloj, sindono kaj energio, vivu ankoraŭ longe por la bono de nia afero en Aŭstrujo. Oni povas kelkfoje ne konsenti kun li pri detalo, sed estas nekontestebla fakto, ke li bonon faris por Esperanto. Apud li, nova Steiner kun sia filo, du promesplenaj novaj fortoj, kiuj certigas, ke ĉi nomo ne malaperos el nia movado. Kaj se ni parolas nun pri unua monumento, ni memoru, ke la unua monumento je honoro de D-ro Zamenhof estis starigita en la jaro 1914 en Franzensbad (tiutempe sub Aŭstra regado), iniciatite de J. Hechtl. La monumento malaperis dum la nazi-okupacio. Wörgl do povas laŭrajte diri "unua" monumento en Aŭstrujo.

Verkoj de

WILLIAM SHAKESPEARE

Tradukitaj de STEPHEN A. ANDREW

Romeo kaj Julieto	84 paĝoj
Antonio kaj Kleopatro	90 paĝoj
La Gajaj Edzinoj de Windsor	89 paĝoj

KAJ JUS ELDONIĜIS

Trojlo kaj Kresida	94 paĝoj
-----------------------------------	----------

Ĉiu teatraĵo broŝ. po 2ŝ. 8p. afrankite (8 rpk.)


Eldonitaj de :

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe :

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso — kutime 1 horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Lundo	18.00–18.30	Rabat. 482m. K (francilingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko.
	22.15–22.40	Hilversum, 402m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala C.d., C. Ameriko.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV. Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (vidu sube). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde, sed ĉiusemajne. M.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Hilversum (N.C.R.V.) : Jen la programo prezentota de Kristana Unuiĝo de Nederlandaj Esperantistoj :

3 oktobro : Branĉo kaj arbo vinberaj (S-ro A. Storm)

14 novembro : Kaj la maro jam ne ekzistas (S-ro A. de Smit)

(Post 1 oktobro la ondlongo estos 402m.)

Radio Roma : en septembro : 10, Itala komponisto : Francesco Cilea ; 12, La Kristaneco : Sankta Bonaventuro ; 17, Fabelo ; 19, Itala literaturo : Ludovico Ariosto aŭ Intervjuo pri la 24-a Itala Kongreso de Esperanto ; 24, por geknaboj, *Pinokjo* ; 26, La Kristaneco : Sankta Tomaso el Aquino.

Aprobinda konkurenco ! Ni eksciis kaj plezure konstatis, ke ĉiuj kvin nederlandaj radiorevuoj publikigas ĉiun duan semajnon la Esperantlingvajn programojn de la tuta mondo. Dankon al ili !

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 241

12-an de Augusto 1952

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Julio, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1951 :

	1951	1952
Asociaj membroj ..	6560	6794
Individuaj membroj		
MJ 826		869
MA 4410		3671
MS 274		501
Patronoj .. 16		10
DM 222		262
HM 58		57
	5806	5370
	12366	12164

Nova aliĝinta landa asocio : Serbia Esperantista Ligo, Zemun (Beograd VIII) V., Masleše 8, Jugoslavujo.

Novaj komitatanoj : S-ro Tibor Sekelj, Poste Restante, Guatemala Cd., Gvatemalo, Centra Ameriko.

D-ro Vuko Jovanović, Zemun (Beograd VIII) V., Masleše 8, Jugoslavujo.

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Eisenstadt. D : H. Bauer, Hartlsteig 13.

Ernstbrunn. D : H. Huber, Simonsfeld Post Ernstbrunn.

Kalwang. D : S-ino H. Kaltenegger, Kalwang 42.

Wieselburg a.d. Erlauf. D : H. J. Plehn, Rottenhauser Str. 8. Tel : 2.

Brazilo

Baturite (Ceará). FD (Medicino) : D-ro A. Cavalcante de Aguiar, Praça Santa-Luzia 118.

Curitiba. D : K. Siedlecki, Av. Visconde de Guarapuava 3102, ap. 4.

Itajuba. (M.G.). D : H. Leite Pinto, Rua Miguel Braga 95. Tel : 33.

Pedregulho. D : vakas.

Pelotas. (R.G.S.). D : D. Soares, Caixa Postal 397.

Pôrto Alegre. FD (Instruado komerca) : V. Almeida, Rua Benjamin Constant 1848. Tel : 2-1836.

São Paulo. VD : M. Rodrigues Monteiro, Parque D. Pedro II, 1092, Edifício Guarani 12, Apt. 126.

Britujo

Bolton. D : H. T. Somerville, 38 Russell St. Tel : 3215.

Cambridge. D : J. E. Jackson, 162 Gilbert Road. Tel : 3809.

Leeds. FD (Komerco) : vakas.

Oxford. D : A. D. Foote, Manchester College. Tel : 3010.

Poole. La informo en la lasta numero ke D. vakas estis eraro.

La D. estas S-ino I. Myers, 36 Parkstone Road.

Stroud. D : L. S. Symes, Quains, Minchinhampton, Glos. Tel : Brinscombe 2201.

Egiptujo

Peranto : vakas.

Finnlando

Karijoki. D : Juhani Kiviluoto, Karijoki kk. Tel : 25

FD (Turismo) : La D.

Koijärvi. D : vakas.

Lahti. D : Antti Rätty, Lahti, Kukki.

Orimattila. D : vakas.

Francujo

Angers. FD (Turismo) : vakas.

Rochefort/Mer. D : P. Babin, Lycée P. Loti. FD (Instruado) : La D.

Romorantin. D : vakas.

Germanujo

Bad Kissingen. D : H. Röllinger, Frühlingstr. 6a. Tel : 2717.

Dietramszell. D : Benno Suttner, (13b) Dietramszell über Holskirchen (Oberbayern). Tel : 132.

Hamburg. FD (Bankaj aferoj) : K. Schmidt, Lesserstr. 48, Hamburg-Wandsbek. Tel : 28 10 44.

FD (Komerco) : H. Schütt, Brandstwierte 29/95, Hamburg 11. Tel : 33 65 17.

Hispanujo

Tarragona. FD (Turismo) : La D.

Tarrasa. FD (Ĉarpentado) : V. Aris, Arquimedes 83.

Hungarujo

Szeged. D : vakas.

Izraelo

Petach-Tikva. FD (Ĵurnalismo) : vakas.

Tel-Aviv. FD (Ĵurnalismo) : O. Berman, 6 Shilo Street.

Jugoslavujo

Ĉefdelegito : S-ino E. Lapenna, Nova Ves 32/III, Zagreb.

Kameruno

Foumbot. D : S-ino Suzanne Eymin, Foumbot, Kamerun.

Kanariaj Insuloj

Santa Cruz de Tenerife. D : A. Llinás Bellvehi, Avnda. José Antonio 2a. 5a. FD (Transporto meĥanika) : La D.

Nederlando

Amsterdam. FD (Katolikismo) : G. Ellerman, de Clercqstraat 42, Amsterdam—W. Tel : 89194.

Leeuwarden. FD (Poŝto) : vakas.

Steenwijk. D : J. F. Drost, Molenwal 5. Tel : 2011.

FD (P.T.T.) : La D.

Nov-Zelando

Waimate. D : vakas.

Portugalujo

Lisboa. FD (Kristanismo) : vakas.

Rodezio

Buluwayo. D : W. Bickley, P.O. Box 108, Buluwayo, S. Rodezio. Tel : 2861.

Mutanda. FD (Lingvoj) : vakas.

Sud-Afriko

Pretoria. FD (Policaĵ aferoj) : vakas.

Svislando

Bern. FD (Libro-bindado) : H. Herrmann, Vorstadt 24.

Zug. D kaj FD : vakas.

Urugvajo

Melo. D : E. Martínez, 18 de Julio 568. Tel : 311.

Tala. D : Huidobro Almada.

Trinidad. D : F-ino V. Leal, Fondar 295.

Usono

Fort Lee (N.J.). D : vakas.

McKeesport (Pennsylvania). FD (Bank-aferoj) : G. A. Briggs, 2613 Banker Ave.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

D-ro A. C. de Aguiar, Baturité, Brazilo

S-ro A. B. Conceicao, Coração de Jesus, Brazilo

S-ro J. A. Veloso, Coração de Jesus, Brazilo

D-ro J. A. Pinto do Carmo, Rio de Janeiro, Brazilo

PATRONOJ 1952

10. Veloso, S-ro J. A., Coração de Jesus, Brazilo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

471. Van Gindertaelen, D-ro T., Mechelen, Belgujo

472. Corrêa, S-ro E., Porto Alegre, Brazilo

473. Maranhao, D-ro A. de A., Baturité, Brazilo

474. Oliveira, S-ro J. F., Baturité, Brazilo

475. Carvalho, D-ro J. de, Coração de Jesus, Brazilo

476. Macedo, S-ro J. A. de, Coração de Jesus, Brazilo

477. Macedo, S-ro R., Coração de Jesus, Brazilo

478. Mattos, S-ro L. de, Coração de Jesus, Brazilo

479. Prates, S-ro J. A., Coração de Jesus, Brazilo

480. Rabelo, S-ro H. L., Coração de Jesus, Brazilo

481. Veado, S-ro W., Coração de Jesus, Brazilo

482. Barreto, D-ro S., Coração de Jesus, Brazilo

483. Brandao, S-ro C. C. de M., Rio de Janeiro, Brazilo

484. Oliveira, S-ro J. L. de, Coração de Jesus, Brazilo

485. Souza, D-ro A. P. de, Coração de Jesus, Brazilo

486. Bevan, S-ro G., Wrexham, Kimrujo

487. Musih, S-ro L., Buenos Aires, Argentino

488. Thawley, S-ro E., Wellington, Nov-Zelando.

489. Rawson, S-ro R., Upwey, Aŭstralio

490. Myers, S-ro W. T., Lakeland, Fla., Usono

491. Somerville, S-ro H. T., Bolton, Anglujo

492. Planck, S-ino M. L. von, Kitzbühel, Aŭstrujo

493. Bador, F-ino, Torbes, Francujo

494. Costa, S-ro A. C. A., Belo Horizonte, Brazilo

495. Souza, D-ro J. B. de M., Rio de Janeiro, Brazilo

496. Araujo, F-ino H. E. de, Vitoria, Brazilo

497. Wood, S-ro O. A., Coventry, Anglujo

498. Andres, S-ro A., Skoger, Norvegujo

499. Williams, S-ro P., Timaru, Nov-Zelando

500. Clark, S-ro J., Crook, Anglujo

501. Boge, S-ro E., Högsby, Svedujo

502. Knight, S-ro F. E., Dorchester, Anglujo

503. Sattley, S-ro K., Chicago, Ill., Usono

504. Souza, D-ro J. M. de, Juazeiro, Brazilo

505. Costa, D-ro J. M. da, Salvador, Brazilo

506. Gobbo, S-ro D. B., Americana, Brazilo

507. Sabaro, D-ro J. R. R., Salvador,
Brazilo

508. Elliott, F-ino F. J., Chesterfield,
Anglujo

DONACOJ. G. Bevan 10ŝ., F-ino M. K.
Barnes 2ŝ. 6p., F-ino A. E. Booy 10ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Enigma Konkurso

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 67-a konkurso : S-ro A. H. v. d. Broek (Ned) 158, S-ro C. W. M. Baans (Ned) 157, S-ro Ch. de Corte (Belg) 155p. Gajnis la premiojn post kontrolo de la 68-a konkurso : S-ro H. Westergaard (Dan) 169, S-ro B. S. Trier (Dan) 168, S-ro A. G. Rickwood (Angl) 159p.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 69.

N-ro 154 : Pli zorgas unu patrino pri dek infanoj ol dek infanoj pri unu patrino.

N-ro 155 : Post dorma trankvilo venas bona konsilo. Pirato, sturgo, moduli, montri, gitaro, karafo, kranio, aktivo, limako, averti, anĝelo, brusto, denaro, barako, finalo, aresti, elipso.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 70.

N-ro 156 : En ŝerco kaj ludo ofte sidas aludo. Ansero, depeŝo, porcio, akrido, kajero, lanugo, adopti, frosto, sterko, viskio, padeli, eskapi, mulato, komodo.

N-ro 157 : Sprit' en tempo neĝusta estas tre malbongusta. Vi varmigos serpenton, ĝi al vi enpikos la denton. Se muso nur unu truon disponas, ĝi baldaŭ la vivon fordonas. Pli feliĉa estas martelo insultata ol amboso batata. Metio manĝon ne bezonas, kaj manĝon tamen donas.

Internacia Konkurso 1952

Stato je 31a de Julio 1952

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Izraelo ..	350	495	141.4
2. Maroko ..	500	575	115.0
3. Norvegujo ..	1700	1950	114.7
4. Brazilo ..	4500	4968	110.4
5. Kanado ..	250	270	108.0
6. Italujo ..	2200	2290	104.9
7. Islando ..	400	400	100.0
8. Aŭstralio ..	850	845	99.4
9. Japanujo ..	900	885	98.3
10. Germanujo ..	3200	3140	98.1
11. Urugvajo ..	250	245	98.0
12. Svislando ..	1400	1365	97.5
13. Nederlando ..	4800	4502	93.8
14. Sud-Afriko ..	300	280	93.3
15. Belgujo ..	2300	2090	90.9
16. Francujo ..	5500	4976	90.5
17. Usono ..	2500	2253	90.1
18. Danlando ..	2700	2410	89.3
19. Britujo ..	12000	10375	86.5
20. Hispanujo ..	1300	1105	85.0
21. Finnlando ..	2600	2035	78.3
22. Nov-Zelando ..	800	615	76.9
23. Svedlando ..	5200	3990	76.7
24. Kubo ..	250	185	74.0
25. Aŭstrujo ..	1000	690	69.0
26. Portugalujo ..	800	540	67.5
27. Irlando ..	250	150	60.0

Esperantista Vivo

Naskiĝoj

Ohana. Al Ges. Ohana (gedelegitoj de UEA, 1 Rue de la Kasbah, Marrakech, Maroko) tria infano, filino Jocelyne, je 5 aŭgusto 1952. Ŝiaj du fratinoj jam bone parolas Esperanton.

Smith. Al Ges. N. R. Smith (90 Fortess Road, London N.W.5., Anglujo) filo Peter Alexander, je 15 aŭgusto 1952. Ĉar Esperanto estas la hejma lingvo (S-ino Smith antaŭe estis F-ino Helga Munkelt el Hamburg, Germanujo) ni bonvenigas denaskan Esperantiston.

Geedziĝo

Navarro—Forné. F-ino Maria Navarro kaj S-ro J. Juan Forné, VD de UEA en Valencia, (Taquiĝrafo Marti 3), Hispanujo, je 5 marto 1952.

Al ĉiuj ni esprimas nian sinceran gratulon.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Sed ĉar ni estas el la tago, ni estu sobraj, surmetante la kirason de fido kaj amo, kaj, kiel kaskon, la esperon de savo. 1 Tes. 5. 8.

Esperanto-Asocio de New York kunvenas ĉiumonate. Ĉiuj bonvenaj. Telefonu : BU-4 0963. Dormont.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo, LOONOPZAND (N. Br.), Nederlando.

Belga Fremdultrafika Servo. Bonvolu sendi: Eŭropajn vojaĝprospektojn, adresojn de Vojaĝentreprenoj. Mi rekompencos. 109 Konijnenperken, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belujo.

LERNIGU VIAJN INFANOJN laŭ la angla maniero! Progresema lernejo sendependa bezonas internulojn el ĉiuj landoj. Vidu kovrilpaĝon 4 de la maja numero kaj skribu al la lernejestro, Caius School, Kingston Buci, SHOREHAM-BY-SEA, Sussex, Anglujo.

La Sunkrono estas bela verko de nederlanda verkistino Marie Koenen (tr. v. d. Vijver). Prezo 2ŝ. 3p., afranko 4p. (8 rpk.). Mendu ĉe UEA aŭ vialanda libroservo.

S-ro Adalberto Fonseca, Rua Dr. José Maria 908, RECIFE, Pernambuco, Brazilo. deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, poŝtmarkojn, revuojn, leterojn, k.t.p. Respondo garantiata.

21-jara studento kaj lia 13-jara fratino deziras korespondi kun ĉiuj landoj. Nepre respondos. Adreso: Valo Derevenec, Okr. obyt. domy, ŠALÁ, Ĉeĥoslovakujo.

Newcastle grupo, Aŭstralio : kelkaj novaj membroj deziras korespondi kun aliaj Esperantistoj pri ĉio interesa. Sekretario, Esperanto-Grupo, 51 William Street, Tighes Hill, NEWCASTLE, Aŭstralio.

30 gelernantoj deziras korespondi tutmonde kaj organizi letervesperon en Novembro 1952. Skribu klare (l., p.i.) al S-ro Jorge Abraham, Alem No. 62, VENADO TUERTO, Argentino.

F-ino P. James, HAREWOOD END, Herefordshire, Anglujo, 17-jara, deziras korespondi kun geesperantistoj tutmondaj, prefere en Eŭropo aŭ Afriko.

Kiu deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kontraŭ Izraelaj sendu al S-ro Oskar Berman, 6 Shilo Street, TEL-AVIV, Izraelo.

Ĉu interesas vin Nov-Zelando, la lando de la maorioj, vulkanoj, pratempaj arboj kaj bestoj? Petu korespondantojn de W.E.A.-Sekretario, Symonds Street, AUCKLAND, Nov-Zelando.

Mi deziras interŝanĝi neuzitajn poŝtmarkojn el mia lando kontraŭ novaj, neuzitaj poŝtmarkoj el ĉiuj landoj, precipe el Sud-Afriko, Turkujo, Egiptujo, Norda kaj Suda Ameriko, Bulgarujo, Britujo kaj kolonioj. Mia adreso: Paul Duterque, 11 rue Zimmermann, VIRE (Calvados), Francujo.

Brita Esperanta Kongreso en bela Bournemouth, Pentekosto 1953. La L.K.K. speciale bonvenigos gejunulojn; specialaj aranĝoj farotaj. Geesperantistoj alilandaj bonvenaj. Plua informo de W. Laurie, 6 Marlborough Road, BOURNEMOUTH, Anglujo.

Por propangandi pri Esperanto kaj altiri novlernantojn, lerneja grupo aranĝos ekspozicion el ilustritaj poŝtkartoj dum Novembro. Bonvolu sendi multnombre al: Temple Esperanto-Klubo, Temple School, STROOD, Kent, Anglujo.

Atentu geamikoj! Sendu al mi informojn pri kristnaskaj kutimoj el ĉiuj neanglaparolantaj landoj, mi petas. Notu: en du partoj—por infanoj kaj plenkreskuloj. La materialo estas dezirita por artikoloj en anglaj gazetoj. Skribu rekte al: S-ro Albert Laverick, 46 Station Road, HETTON-LE-HOLE, County Durham, Anglujo.

Deziras aĉeti Esperanto-lernolibrojn kaj vortarojn por hispanparolantoj. Adreso: José Del Pino, Ap. 216, TRUJILLO, Peru, Sudameriko.

Aŭtunaj Internaciaj Feriaj Esp.-kursoj okazos en La Sporta Altlernejo de Vejle, Danlando, 19-26 de okt. Ankaŭ vi estos kore bonvena. Detala prospekto havebla ĉe L. Friis, Ingemannsvej 9, AABYHØJ, Danlando.

Geedzoj (40-34 jaraĵ) sen infanoj, deziras korespondi kun eksterlandanoj kaj poste, se eble, pasigi ferion je bazo de reciprokeco. Nepre respondos. C. Jongen, Heerlenersteenweg 25, TERWINSELEN (L), Nederlando.

NOVA KAJ TRE ALLOGA LIBRO



LA ALASKA STAFETO

kaj

KAPTITOJ DE LA GLACIROKOJ

Originale verkitaj de F. Omelka

La supraj verkoj aperis unue kiel felietonoj en
“ Esperanto ” 1949 kaj 1951.

Ili nun aperas en libroformo, kun aldonitaj
fotoj, skizo pri la aŭtoro kaj plano de Alasko.

Formato 22 × 14.5 cm. 96 paĝoj

Tole bindita kun bilda polvsirmilo

Prezo 6 ŝilingoj, afranko 4p.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe vialanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

